# der esperantist

**Mitteilungsblatt des Esperanto-Verbandes im Kulturbund der DDR**

22. Jahrgang | Nr. 138 (4/1986) | ISSN 001 4-0619 | 30 Pf


## Vivas la spirito de Thälmann

La popolo de GDR kune kun progresemaj fortoj de aliaj popoloj solenis la 100-an datrevenon de Ernst Thälmann en la antaŭvespero de la plej grava kulmino en la socia vivo de GDR ĉijare — en la antaŭvespero de la 11-a Partikongreso de la Socialisma Unuiĝinta Partio de Germanio. La rolon de Ernst Thälmann en la historio de la partio kaj de la popolo la prezidento de la GDR-parlamento Horst Sindermann en referaĵo dum la scienca konferenco de la Instituto por Marksismo-Leninismo ĉe Centra Komitato de SUG karakterizis jene: „En či tiu historio Ernst Thälmann reprezentas en la periodo de la mondmilitoj kaj de la faŝismo la idealojn de la paco, de la demokratio kaj de la socialismo."

Por ni geesperantistoj en Kulturligo de GDR la Thälmann-jubileo estas nedisigeble ligata kun alia jubileo en 1986 — kun la 75-jara datreveno de la fondiĝo de la Germana Laborista Esperanto-Asocio. La celebrado de ambaŭ jubileoj ekzemple fare de la Leipzigaj esperantistoj kaj de iliaj pli ol 200 gastoj dum IFER 86 aŭ de Berlinaj esperantistoj dum solena kunveno en la iama Karl-Liebknecht-Domo esprimas la tradician linion, kiun daŭrigas nia Esperanto-Asocio.

„Čiu proletara esperantisto donos sian voĉon la 13-an de marto al Ernst Thälmann!" Tiu alvoko en la „Arbeiter-Esperantist" en marto 1932 videbligas, ke GLEA dum la 20-aj kaj 30-aj jaroj evoluis al organizaĵo, kiu kune kun aliaj proletaraj organizaĵoj kunefektivigis la politikon de la Komunista Portio de Germanio, kies gvidanto depost 1925 estis Ernst Thälmann.

Kiam Thälmann en 1925 estiĝis prezidanto de la Centra Komitato de la Komunista Partio la 38-aĝulo jam disponis pri tiuj ecoj, kiuj kapabligis lin gvidi la Partion en la batalo por la čiutagaj vivinteresoj de la laboruloj, en la batalo por paco, demokratio kaj socialismo.

La transporta laboristo nun gvidanta la Komunistan Partion proprasperte konis la ekspluatadon kaj sciis pri la mizero de la laborista vivo, sed li disponis ankaŭ pri spertoj, kiamaniere la laboristoj povas defendi siajn rajtojn, kiamaniere ili povas kontraŭbatali siajn malamikojn kaj kiamaniere ili fine povas liberigi sin de ili kaj konstrui novan sociordon kiel en Sovetunio.

La CK sub lia gvidado koncentris la laboron de la partio al efika batalo por la plej urĝaj vivbezonoj — la okhora labortago, plialtigoj de salajroj, sufiĉa subteno por la senlaboruloj, kontraŭ loĝejmizero kaj lupreza uzuro, por la samrajteco de la virinoj kaj de la junuloj kiel ankaŭ por la plej elementaj demokrataj rajtoj kaj por ties ligo kun la batalo por la socialismo.

„La Komunista Partio ne konas partiintereson apud la klasintereso de la laboristo", skribis Thälmann, „ĝia poli-

tiko estas la politiko de la laborista klaso."

Tiu politiko gajnis la konfidon de popolamasoj. Sub gvidado de Thälmann KPG evoluis al la due plej forta sekcio de la Komunista Internacio de iu ajn kapitalisma lando. En 1932 ĝi ricevis 6 milionojn da voĉoj en Germanio.

En GLEA la influo de KPG plifortiĝis. Komunistoj kiel Otto Bäßler, Willi Vildebrand, Adolf Schwarz kaj aliaj decide influis la agadon de GLEA. En 1930 la asocio membriĝis al la laŭ iniciato de KPG kreita Komunumo de Interesatoj por Laborista Kulturo (IfA). En la sama jaro la asocian kongreson de GLEA unuafoje partoprenis membro de la Centra Komitato de la Komunista Partio, Wilhelm Florin. Li diris: „Laŭ mandato de la Centra Komitato de la Komunista Partio kaj de la komunista frakcio en regna parlamento mi transdonas al vi revoluciajn batalsalutojn. La partio ĉiam rigardis ĝin kiel unu de siaj plej noblaj taskoj kaj ĉiam havis la plej fortan intereson pri tio, subteni ĉiujn kulturorganizaĵojn en ilia batalo. . . . La kapitalo strebas konservi la staton de la proletaro sur plejeble malalta kulturstadio, la revoluciaj organizaĵoj male strebas plialtigi la kulturpolitikan nivelon, kvankam tiu stato ne antaŭ la subigo de la kapitalista klaso povas esti akirota. En unu lando la proletaro akiris la potencon, kaj tie via movado trovas plenplenan subtenon. La ligo kun la patrio de ĉiuj laboruloj — Sovetunio — devas esti finkonstruota en plej forta mezuro, por ke en akcelata rapideco povas esti farota sukcesa laboro en la intereso de via movado kaj de la tuta proletaro."

La laboristaj esperantistoj tre vigle evoluigis la kontaktojn inter sovetiaj kaj germanaj kamaradoj. Gravan kontribuon ekzemple faris la Proletara Esperanto Korespondado. La organo de la Komunista Partio „Rote Fahne" (Ruĝa Flago) skribis la 1-an de majo de 1931: „Kun la plej granda laŭdo ni sciigas, ke ĉiuj majaj salutoj el USSR kaj la aliaj landoj per perado de la Laborista Esperanto Asocio . . . estis tradukitaj kaj peritaj al ni. . . . kaj tiu cirkonstanco, ke la kampanjo de la laboristaj korespondantoj por la 1-a de majo estis aranĝita tiel grandstile kaj skrupule, montras la eminentan signifon de la Esperantomovado por la internaciaj rilatoj de la revolucia laboristaro." Alia ekzemplo de la multflanka agado de GLEA por efektivigo de la politika linio de KPG estas la en 1930 en Leipzig komune de GLEA kaj loka KPG-estraro laŭ la Thälmanna devizo „La triumfiro de la socialismo en Sovetunio estas nia plej forta argumento" organizita aranĝo pri la 5-jarplano en USSR, pri kiu „Sennaciulo" raportis.

La averton de Thälmann pri la danĝeroj de faŝismo kaj milito kaj la alvokon al agadunueco de la laborista klaso GLEA sekvis. Thälmann proprasperte konis la militon. La terura travivaĵo de la Unua Mondmilito plifortigis lian malamon kontraŭ militarismo kaj milito. En liaj postaj malliberejaj notoj li skribis: „Ni kiuj partoprenis tiun militon, ni travivis la teruron, ni ekkonis la hororon kaj murdadon kaj per tio ni havas certan respondecon, ne facilanime oferi eĉ unu guton da sango." Thälmann faris multajn proponojn al la gvidantaro de la alia laborista partio en Germanio, al la Socialdemokrata Partio, sed ĝiaj dekstraj gvidantoj evitis komunan antifaŝistan agadon. Laŭ propono de Thälmann KPG fondis Antifaŝistan Kampanjon, kies celo estis kolekti ĉirkaŭ la laborista klaso ĉiujn laborulojn en la batalo kontraŭ faŝismo.

En la Laborista Esperanto-movado respeguliĝis la disputo kun la dekstraj socialdemokratoj. Ili instigis skismon en la Laborista Esperanto-Asocio, sed la plejmulto de la membroj sekvis la politikon de la estraro. GLEA sub sia juna prezidanto Willi Vildebrand konsekvence sekvis la orientigon de Thälmann al antifaŝista agadunueco.

Tamen pro la neunueco de la laborista klaso la faŝismo povis transpreni la potencon. Al la unuaj viktimoj de tiu barbara reĝimo apartenis ankaŭ Thälmann. Dum 11-jara aresto li restis neŝancelebla. Li estiĝis simbolo de la rezistado kontraŭ faŝismo kaj milito. Mondvasta estis la batalo por lia liberigo. Romain Rolland nomis lin „sim-

bolo de la granda paco inter la liberigitaj popoloj kaj de la internacio de la laboristoj de la tuta mondo".
La faŝistoj ne kuraĝis procesi kontraŭ li. Ili ne duafoje volis travivi la fiaskon kiel dum la proceso kontraŭ Dimitrov kiu glore defendis sin kaj senmaskigis kaj akuzis la faŝistan reĝimon.
La partio de Thälmann elproviĝis sukcese en tiu malhela tempo. La komunistoj edukitaj en la partio sub lia gvidado plej konsekvence kaj ofereme gvidis la rezistmovadon kontraŭ la terorreĝimo de la faŝismo.
Laboristaj esperantistoj spite al la malpermeso de GLEA ankaŭ daŭrigis la antifaŝistan batalon. En Berlin ekzemple estiĝis per iniciato de la iama GLEA-funkciulo Adolf Schwarz neleĝa rezistgrupo, kies kerno estis iamaj laboristaj esperantistoj. Tiu generacio edukita de KPG sub gvido de Thälmann estis ankaŭ la unuaj aktivistoj post la venko super la faŝismo.
La revolucian Thälmannan spiriton la faŝistoj ne kapablis murdi spite al la terura teroro kontraŭ la klaskonsciaj laboristoj, spite al la murdo de Thälmann mem.
Iamaj laboristaj esperantistoj apartenis al la konstruantoj de la antifaŝisma-demokrata ordo kaj poste al la konstruantoj de GDR. Mi nur memorigas pri Ludwig Schödl, kiu en 1945 helpe de sovetiaj oficiroj fondis hejmon de gejunuloj, kies gepatroj estis viktimoj de la faŝismo, kaj poste dum multaj jaroj gvidis la „lernejon de paco" en Neuruppin. Mi memorigas pri Werner Habicht, kiu organizis la unuan partigrupon en la laminejo de Waltershausen, pri Erich Würker, la merita inventisto.
Ili kaj multaj aliaj partoprenis la efektivigadon de la idealoj de Thälmann post la liberigo fare de Sovetunio kaj partoprenas la plifortigon de socialismo en GDR en la spirito de Thälmann. Ilia agado reprezentas nian tradician linion, la spiriton de Thälmann, kiu inspiras nin geesperantistoj en GDR partopreni la plifortigon de nia socialisma ŝtato kaj de la socialisma tendaro, la plifortigon de la porpacaj fortoj.

**Literaturo kaj fontoj:**


1. Ernst Thälmann — eine Biografie, Band 1-2, Dietz-Verlag, 1980
2. Ernst Thälmann, Über proletarischen Internationalismus, Reden und Artikel, Verlag Philipp Reclam jun. Leipzig, 1977
3. Günter Hortzschansky, Ernst Thälmann — Beispiel und Kraftquell für die Meisterung gegenwärtiger und zukünftiger Aaufgaben, in: Geschichtsunterricht und Staatsbürgerkunde 12/85, Volk und Wissen Volkseigener Verlag, Berlin
4. Unsere Partei erfüllt erfolgreich das Vermächtnis Ernst Thälmanns, Horst Sindermann auf der wissenschaftlichen Konferenz des Instituts für Marxismus-Leninismus, Neues Deutschland vom 13. März 1986, p. 4
5. Geschichte der Arbeiter-Esperanto-Bewegung von den Anfängen bis zum Beginn des 2. Weltkrieges, nepublikigita Manuskripto de Dr. Blanke, 1974


**Fritz Wollenberg**

**Mallongigoj:** SUG — Socialisma Unuiĝinta Partio de Germanio/IFER — Internacia Foira Esperantisa Renkontiĝo/GLEA' — Germana Laborista Esperanto-Asocio/CK — Centra Komitato/KPG — Komunista Partio de Germanio.

**Okaze de la 85-a naskiĝtago de veterano**

## Rememore pri prof. Simeon Naumovič Podkaminer

Mi esperantiĝis eble 1957 kaj ne pasis multe da tempo, kiam mi pli kaj pli ofte aŭdis la nomon S. N. Podkaminer, eminenta aktivulo, kiu en Soveta Unio laboris por la reorganizado de Esperanto-movado. Kiam 1965 estis fondita en GDR en la kadro de Kulturligo „Centra Laborrondo Esperanto" ne plu pasis multe da tempo, kaj mi havis la feliĉon persone konatiĝi kun la profesoro. Tio estis dum somero 1967, kiam okazis en Rostock la unua oficiala internacia Esperanto-aranĝo en la historio de GDR entute, nome en la kadro de la Semajno de la Balta Maro.
Ankoraŭ mi posedas sonbendajn specimenojn pri liaj tiamtempaj elokventaj elpaŝoj.
S. N. Podkaminer estis tre intima ami-

ko de la germana popolo, li, kiu tre arde kontraŭbatalis en Leningrad la germanajn faŝistojn. 1975, 1977 kaj 1980 li vizitis nian landon kiel membro de delegitaro de iamaj kulturaj oficiroj, kiuj, sub la gvido de prof. Sergej Tjulpanov, 1945 restarigis la kulturan vivon en la sovetia okupita zono de Germanio. Podkaminer respondecis tiutempe pri la plebiscito kaj kontrolis kiel kolonelo en Saksio, ĉu ĉio estis demokratie preparita. La jam forpasinta germana esperantisto Walter Röhner el Dresden, kiu dum multaj jaroj estis prezidanto de la Distrikta Laborrondo Esperanto (kaj posta Distrikta Estraro de GDREA) en Dresdeno, rememoris ke 1945 sovetia kolonelo vizitis la lernejon, kie laboris Röhner kaj kie oni preparis balotilojn por la plebiscito, por kontroli. Jardekojn poste, kiam Röhner kaj Podkaminer konatiĝis interŝanĝante rememorojn, evidentiĝis, ke ĝuste ili ambaŭ 1945 en tiu klasĉambro ...

Profesoro Podkaminer estis distingita per la plej alta ordeno de Kulturligo, per la Johannes-R.-Becher-medalo en oro. La medalo portas la nomon de la fondinto de Kulturligo, amiko de prof. Tjulpanov, la unua kulturministro de GDR, konata poeto kaj dramverkisto. Lin ankaŭ persone konis S. N. Podkaminer. Tre kortuŝa travivaĵo por mi estis, kiam S. N. Podkaminer dum oktobro 1977 malfermis la partian lernojaron de la čefa sekretariejo de Kulturligo en Berlin. Li faris prelegon pri la rezistado en Leningrad kontraŭ la faŝistoj dum la 900-taga sieĝo. Mi havis la taskon traduki el Esperanto germanen kaj mi bone memoras, kiom ofte dum la parolado sufokiĝis al li la voĉo pro la teruraj rememoroj. Mi kredas, ke tiu malferma aranĝo de la partia lernojaro estis la plej efika kaj impulsa, kiun mi ĝis nun travivis.

Dum diversaj renkontiĝoj kun la profesoro en GDR kaj eksterlande mi ofte utiligis la okazon longe konversacii kun li. Mi estas feliča posedi kelkajn sonbendigitajn intervjuojn.

Por mi Podkaminer — kristalklara karaktero, malamanto de karieristoj kaj burokratoj, vera batalanto — estas modelo de sovetia komunisto. Mi scias pri liaj meritoj por la reorganizado de la sovetia Esperanto-movado. Li estis vicprezidanto de ASE kaj prezidanto de la sovetia MEM-Komitato, vicprezidanto de MEM. Mi ankaŭ scias, ke li havis malamikojn. Sed ili estis de tiu speco, ke tia malamikeco nur honorigis lin. La esperantistoj de GDR omaĝis al li diversmaniere. Aperis liaj materialoj en GDR-eldonoj de Paco. Aperis ampleksa artikolo en „der esperantist" 6/80 okaze de lia 80a naskiĝtago kaj, bedaŭrinde okaze de lia forpaso en „de" 5/1982. Eble lia testamenta artikolo estas „MEM-movado" sur la pli altan ŝtupon", kiu aperis en „de" 1/1982. Mi scias, ke li volis verki pri la historio de la sovetia Esperanto-movado. Ĉu iu scias pri la materialoj? Kiu prenos la torĉon?

Vera komunisto, por mi, devas batali por antaŭenigi valorajn idealojn. Tia homo estis S. N. Podkaminer. Li forte influis min. Mi dankas al li multon.

Detlev Blanke

**Korekto:** En „de" 137, p. 50 sur la foto ne temas pri prof. Karpenko sed pri la prezidanto de la urba soveto de Volgograd. Ni petas pardonon pro la eraro. La red.

## Verda alfabet-supo

**Bernard Golden**

Vane vi serĉos recepton por verda alfabet-supo en La Internacia Kuirlibro, kaj ĝi eĉ ne estas listigita en Gastronomia Terminaro. Kiam mi estis infano, mi tre ŝatis manĝi supon, en kiu naĝis malgrandaj literoj faritaj el farunaĵo. Fakte, tiu manĝaĵo havas ne nur nutran sed ankaŭ didaktan valoron, ĉar infanoj tiel povas lerni literi vortojn. Tamen, nuntempe mi ne tro emas manĝi alfabet-supon, ĉar mi konstatis, ke la specoj, kiuj estas aĉeteblaj en vendejoj, ne havas supersignitajn literojn, do ne decas surtabligi ilin en ĝisoste esperantista hejmo.

Lastatempe mi rimarkis fenomenon en la uzo de la Internacia Lingvo, kiu memorigas min pri literplena supo. Traleginte plurajn revuojn kaj gazetojn, mia atendo estis altirita al la

čiam plioftiĝanta uzado de mallongigoj. Temas ĉefe pri nomoj de organizaĵoj, sed tiaj litergrupoj anstataŭas ankaŭ ofte ripetiĝantajn vortojn kaj esprimojn. Por ilustri tiun tendencon en Esperanto, mi trakribris la enhavon de „der esperantist" (n-ro 3/4, 1982). Sur la unua paĝo oni povas trovi tekston pipritan per alfabetaĵoj: DDR, Nr., ISSN, Pf., GDR, SUPG, CK, elp., KL, Eĉ kiam oni legas la inicialojn en kunteksto, ili restas kriptaĵo, kiel montras jena frazo sur la sekva paĝo „... parolis d-ro Imre Pethes, vicprezidanto de HEA kaj prezidanto de MEM kaj prof. d-ro B. Kameŝkov, la reprezentanto de ASE kaj de SSOD".
Vane oni serčas en la koncerna artikolo la plenajn nomojn de tiuj organizaĵoj: tute mankas ŝlosilo por deĉifri ilin.
Mi daŭrigos mian listigadon: ĈSSR, ĈEA, AESSR, USSR, IPE, SAT, SEU, EKRELO, AOKS, BulEA, BKP, FDGB, BEA, UEA, TEJO, ZV. Ne kredu, ke la bovlo nun estas plena de verda alfabet-supo, ĉar mia listo atingis nur la 11-an paĝon. Rapide mi nombris la mallongigojn sur la ceteraj paĝoj, kie aperis pli ol 90 litergrupoj. Se mibone kalkulis, tiu numero de la revuo enhavas 75 mallongigojn. Tralegado de la kajero ja estas utila, ĉar ie kaj tie en la artikoloj troviĝas la plenaj nomoj de kelkaj organizaĵoj, sed aliaj ne estas klarigitaj. Tiom da literoj — proporcie — en unu bovlo da alfabetsupo certe donus al manĝanto misdigeston. Al leganto ili donas kapdoloron.
Ankoraŭ unu problemo estas prezentita, ĉar ne ĉiuj mallongigoj anstataŭas esperantajn vortojn. Pluraj estas etnolingvaj formoj kiel WTO (angla), MAV (hungara), SSOD (rusa) kaj FDGB (germana). Cetere, apud la vere internaciaj poŝtaj kaj aŭtomobilnumer-plataj mallongigoj troviĝas aliaj neinternaciaj formoj: jen du duoblaĵoj: CS:ĈSSR, SU:USSR.
Esperantaj tekstoj kun abundo da mallongigoj similas al skribaĵoj larditaj per fremdaj vortoj kaj esprimoj, kiujn neĉiuj esperantistoj povas kompreni. Alia trajto de mallongigoj koncernas ilian prononceblecon. Esperantistoj jam alkutimiĝis legi kaj elparoli mallongigojn kiel TEJO kaj SAT kvazaŭ ili estus vortoj, sed MFGDREA estas nur plenbuŝo da literoj. Tamen, eĉ tiaj longaj mallongigoj fariĝas tolereblej, se ili estas formulitaj kiel akronimoj, t. e. vortoj kunmetitaj el la inicialo aŭ unuaj literoj de sinsekvaj partoj de plurelementa nómo aŭ termino. Eble la unua tia vorto en Esperanto estas la landnomo Usono, kiu konsistas el la inicialoj de la anglaj vortoj „United States of North-America" (Unuiĝintaj ŝtatoj de Nord-Ameriko), al liuj estas aldonita la substantiva finajo „o". Tiel estis kreita la či-supre menciita EKRELO, nomo de eldonejo, kies plena titolo estas Eldon-Kooperativo de Revolucia Esperanta Literaturo.

Tiu ĉi maniero formi nomojn de organizaĵoj kaj ankaŭ terminojn, ŝajne estas facile akceptebla en multaj etnolingvoj, kaj de ili vortoj venas en Esperanton. Plena Ilustrita Vortaro (PIV) registras „Unesko" kaj „Benelukso". El la germana venis „Gestapo" kaj „nazio", kaj la rusa kontribuis „sovĥozo" kaj „komsomolo". Internaciaj teknikaj terminoj kiel „radaro" kaj „lasero" estis formitaj sammaniere. Laŭ la Jarlibro de UEA la plejmulto de la mallongigoj de nomoj de fakorganizaĵoj estas prononceblaj akronimoj; escepto estas LSG pro manko de vokaloj. Kelkfoje oni faciligas la formadon de tiaj akronimoj per nekutima vortorado en la plena titolo; EGLI estas Esperantista Go-Ligo Internacia anstataŭ la pli kutima Internacia Esperantista Go-Ligo (IEGL). Tamen, estas rimarkinde, ke la mallongigoj de malmultaj organizaĵoj finiĝas per la litero „o" kiel TEJO, STELO kaj IABO. Se tiuj akronimoj estas mallongaj, ili estas preferindaj al neprononceblaj litergrupoj, sed ELF-AREK kaj IAdEM jam komencas forpreni la apetiton de ŝatantoj de la ne tro densa verda alfabet-supo.

**[El The Australian Esperantist, 208 (septembro 1983)]**

Rimarko de la redakcio:
B. Golden pravas. Estonte ni klarigos la uzitajn mallongigojn en aŭ fine de la tekstoj.

## Ankaŭ la lingvaj eraroj instruas

Nur tiu povas erari en Esperanto, kiu scias Esperanton. Tio rilatas ankaŭ al la eminentuloj, ja eĉ ili ne povas scii ĉiujn erojn en nia „simpla, facila gramatiko", tiujn de PAG. Tiel povis okazi, ke en bonega traduko legeblas: „Nek mi! Kion? Nek mi! Ĉu nek mi?" Laŭ Plena Gramatiko „tio estas kruda malkorekto" kaj „nek estas uzebla nur kun alia nea vorto". Kion diras PIV? „Nek estas uzata post alia nea vorto." Ekzemploj: Nek plendo nek ploro helpas kontraŭ kreditoro aŭ Ne helpas plendo nek ploro kontraŭ kreditoro (Z). Do, kiel diri la menciitajn malkorektojn? „Eĉ ne mi! Kion? Eĉ ne mi! Ĉu eč ne mi? (nek = eĉ ne) Eĉ ne unu arbeto donis ombron. (Malkorekte: Nek unu arbo . . .)

En artikolo de novenova akademiano mi legis: „. . . tamen li ne estis" la plej unua „katoliko". Nu. se io estas la plej unua, certe oni povas diri, la plej dua, la plej tria ktp. Do, li ricevis la plej unuan premion, ŝi la unuan, tiu la plej duan . . . Ĉu direblas? Ni sidis en la plej unua vico en la teatro aŭ legu la plej unuan paĝon. Certe ne. Temas pri vera hungarismo, „a legelső. Same oni diras hungare „a legutolsó", la plej lasta. Tamen tion ne hungaro skribis, nur en Hungario vivanta fremdulo.

En la novelo de konata verkisto oni povis legi: „Jam foriris la lastega trajno." Do, se mi demandas la deĵorantan fervojiston: Kiam deiros la lasta trajno? — li povas respondi: La lasta je . . ., la plej lasta je . . ., la lastega je . . ., la plej lastega je la . . . horo. Kiel esprimriĉa estas nia lingvo! Sed ne či-kaze.

„Esperanton dum tridek tagoj", jene estas tradukita la titolo de la hungarlingva lernolibro „30 nap alatt eszperantóul." Laŭ la hungara teksto tio signifas, ke oni ellernas Esperanton en 30 tagoj kaj tion asertas ankaŭ la aŭtoro. Ĉu estas korekta la traduko? Mi lernis Esperanton dum 30 tagoj, signifas, ke mi lernis Esperanton dum 30 tagoj, sed ne ellernis ĝin. Mi lernis, sed mi ne finis la lernadon. Ekzemplo el la hungarlingva gramatiko de Kalocsay: Mi finos la tutan libron en kvar tagoj. Do, la ĝusta traduko estas: Esperanto en 30 tagoj. Ni konsultu ankaŭ PG-n. „**En** indikas la tempon necesan por fari agon. Oni ne konfuzu **dum** kaj **en**." Li parolis dum kvin minutoj, sed neutile, ĉar tiajn demandojn oni ne povas respondi en kvin minutoj. Jen titoloj de artikolo: „Dum kvin tagoj Esperanton". „Unu lingvon dum kvin tagoj?" Nu, kiun ajn lingvon oni povas lerni dum kvin tagoj, sed ne elerni ĝin, kvankam la aŭtoro de la artikolo tion volis propagandi. Por tute trankviliĝi, ni konsultu ankaŭ la Plenan Ilustritam Vortaron. **En**, prepozicio montranta la tempolongon necesan por fari ion. Ekz. ellegi libron en kvar tagoj. **Esperanto en dek horoj. Dum**, prepozicio montranta la tempon, en kies daŭro io okazas.

Ofte la lingvaj malkorektoj pli bone, pli efike instruas ol la gramatikaj reguloj. Legante la artikolon, vi certe ne forgesos la uzon de nek, en kaj dum kaj vi ne diros, ke la plej unua homo estis Adamo, ja la kompatinda estis nur la unua.

**Dr. István Nagy**

PAG — Plena Analiza Gramatiko de E-o/PIV — Plena Ilustritab Vortaro de E-o/Z — Zamenhof/PG — Plena Gramatiko de E-o

---

**OFICIALAJ INFORMOJ de la AKADEMIO DE ESPERANTO**

**Nova Serio N° 4**
**Novembro 1985**

**La Akademio vokas ĉiujn Esperantistojn doni sian tutan atenton al la jenaj:**

**REKOMENDOJ PRI LA LANDNOMOJ**

1. Pro respekto al la tradicio, kaj en pacema spirito, ni deklaros, ke landnomo estas taúga, se ĉiuj aú la granda plimulto senkonteste uzas la saman formon.

2. En okazo de konflikto inter du aú pluraj formoj por unu sama landnomo aú inter la uzo de unu kategorio aú la alia por unu sama radiko, la Akademio rekomendas preferi la plej internacian landnomon kaj tiel obei al la 15-a Regulo de la Fundamento.
3. La Akademio rekomendas konsideri, ke la signifo-rilatoj inter la landnomoj kaj la koncernaj landano-nomoj ĉiam estas principe la samaj, kiu ajn estas la kategorio de la landnomoj. Ekz-e, Angl-ujo/-io — Angloj kaj en la alia kategorio Nederland-o — Nederland-anoj.

4. Principe estas malrekomendite nove formi nomon per iu internacia „sufikso" aú sufikse uzata fremda vorto (-io, -(i)stano, ...), se la tiel ricevita landnomo ne jam ekzistas internacie.

**Rimarkoj de la Prezidanto d-ro A. Albault:**

1. Per tiuj rekomendoj la Akademio esperas marki la finon de la diseriga tendenco en la landnomoj. Devus instaliĝi tendenco al unuecigo farita sur sana bazo tradicia kaj fundamenta.

2. Ni memorigas, ke la Akademio jam publikigis liston de 32 landnomoj kaj de 15 landano-nomoj en la Oka Oficiala Aldono al la Universala Vortaro (Aktoj de la Akademio, II, p. 13 — 14). Tiuj nomoj aldoniĝas al la kelkaj nomoj troveblaj en la Fundamento. Ĉiu disciplinema esperantisto severe atentos tiujn listojn.

3. La Akademio ne intencas oficialigi pliajn nomojn. Sed ĉar oni diversflanke petis tian paŝon, ĝi decidis anstataŭe starigi liston de „normaj" landaj kaj landanaj nomoj, kiu povos subiĝi al revizio, kiam necesos. A. A.

**Miroslav Malovec**
**Legaĵo por geknaboj**

Estas konate, ke kompreni fremdan lingvon kaj pensi per ĝi oni ellernas ne el la lernolibro, kiu nur konatigas la fundamentajn gramatikajn regulojn kaj vortojn, sed el la beletraj verkoj, kiuj scias imiti la fremdlingvan medion kaj absorbi per scenriĉa enhavo la leganton. Tre bezonata estas simila legaĵo por la geknaboj 13-18jaraj. En Esperanto ja aperis famaj verkoj La knaboj de Paŭlo-strato de F. Molnár, Timur kaj lia taĉmento de A. Gajdar kaj Tra dezerto kaj praarbaro de H. Sienkiewicz kaj kelkaj aliaj. Tamen por knaba komencanto estas tiuj verkoj tre malfacilaj legaĵoj, ĉar lia vortprovizo en Esperanto ne estas kompreneble tiel granda kiel en la gepatra lingvo. Ĝi respondas al la lingva nivelo de 3-jara infano kaj taŭgas ĉefe por legi fabelojn. Sed dekkvarjarulo ofte pli ol plenkreskulo hontas legi fabelojn, ĉar li ja ne plu estas malgranda infano. Nia movado do bezonas aŭtoron, kiun la geknaboj amas kaj kies lingvaĵo estas facila kaj eĉ simpligebla sen danĝero de artismaj perdoj. Tia aŭtoro ekzistas en la germana literaturo: Karl May kun sia fama Vinetoŭ. Liaj verkoj estas eldonataj en rekordaj eldonkvantoj precipe pro pedagogiaj kaŭzoj. Karl May instruas al geknaboj honestecon, bravecon, kontraŭrasismon, helpon al endanĝerigitoj kaj antaŭ ĉio lernigas la junajn legantojn legi. Absorbitaj de la aventuroj, ili eĉ ne rimarkas, ke ili jam „englutis" milojn da paĝoj. May estis aŭtoro kun grandega fantazio, per kiu li rivalis kun Jules Verne. Sed diference de Verne li ne estis granda artisto kaj tial eblas simpligi lian lingvaĵon uzante sole fundamentan vortprovizon kaj prezenti tiamaniere al la junaj esperantistoj legaĵon facilan, allogan, taŭgan por ilia aĝo kaj samtempe edukan kaj disvolvantan ilian fantazion. En multaj naciaj literaturoj oni jam konstatis, ke kvankam Karl May ne estas granda verkisto, li estas tre **bezonata** verkisto pro edukaj kvalitoj de siaj libroj. La germanaj gesamideanoj devus pripensi, ĉu kontribui per tiu tre valora pedagogia rimedo al la instruado de Esperanto al la neplenkreskuloj.

**Formlose Anmeldungen für die Kongresse 1987**
**Noch bis zum 30. November 1986 nimmt der Esperanto-Verband formlose Anmeldungen für die Esperanto-Weltkongresse 1987 in der VR Polen entgegen (siehe „der esperantist" 3/1986, S. 57).**

## Radioamatoroj kaj Espreanto

Antaú pli ol duonjarcento la amatora radio komencis transsalti distancojn, landlimojn kaj vastajn oceanojn por doni al la ordinara homo teknikan kapablon por rekta voĉa kontakto kun iu ajn loko sur la terglobo.

Historie la uzado de Esperanto por radiomatora kumunikado komenciĝis sur radioamatora kongreso en Parizo en la jaro 1925 kaj per decido, kiun ĉi tiu kongreso akceptis por la prospero de Esperanto. Pro multaj politikaj, ekonomiaj kaj organizaj problemoj antaú la dua mondmilito kaj baldaú post la dua mondmilito, Esperanto inter la radioamatoroj ne multe disvastiĝis. Fundamenton por disvastigo kaj aplikado de Esperanto en la radioamatora laboro metis en la jaro 1970 la 55-a Universala Kongreso de Esperanto en Vieno, kiam estis fondita ILERA — Internacia Ligo de Esperantistaj Radio-Amatoroj.

La unuan fondan kunvenon partoprenis 14 esperantistaj radioamatoroj el 7 landoj. La idea fondinto de ILERA estis la aústra esperantisto-radioamatoro Rudi Bartisch, OE 3 RU+. S-ro Rudi Bartosch mortis en la jaro 1973, sed lia ideo disvastiĝas inter radioamatoroj kaj esperantistoj. La plej aktivaj radioamatoroj estas JR 1 ISG el Japanio. (En Aúgsburgo elektita kiel nova prezidanto de ILERA), UW 9 YE, UK ∅ ABP, UA 4 LBN el Sovetunio, OK 1 AFZ, OK 2 BIZ, OK 2 LS el ĈSSR, F 9 ED, F 6 AXF, F 6 CLV, F 5 RC el Francio, DJ 4 PG, DL 8 CI el FRG, PT 2 CA, PY 3 DP el Brazilio, LU 3 EXQ el Argentino, W 2 CIL el Usono kaj multaj aliaj. Ankaú en GDR la esperantistoj inter la radioamatoroj uzas aktive Esperanton. Dufoje ĉiumonate ili havas renkontiĝon en la etero kaj kelkaj inter ili partoprenis sukcese en radioamatoraj konkursoj Tiun ĉi mondan radioamatoran konkurson sur kurtaj ondoj, kiu daúras 48 horojn kaj dum kiu oni uzas Esperanton, organizas ĉiujare ILERA'.

En la jaro 1977 ILERA fariĝis faka grupo de UEA kaj ĝis hodiaú ĝi havas membrojn el ĉirkaú 50 landoj de la tuta mondo.

Jam multajn jarojn oni aranĝas regulajn kaj internaciajn t. n. „kunvenojn en la etero", dum kiuj oni uzas Esperanton. La ideo de tiuj ĉi kunvenoj estas konvinki vicojn de la radioamatoroj, ke Esperanto estas kapabla por praktika komunikado kaj estas lingvo, per kiu oni povus solvi nunajn lingvajn problemojn inter unuopaj nacioj. Tiun ĉi realan fakton dokumentas jam tio, ke Esperanto post preskaú 100 jaroj de sia ekzistado fariĝas pli kaj multe uzata lingvo, kaj nome ne nur por tradukoj de klasika kaj teknika literaturo, sed ankaú en praktika internacia kontakto.

+Ĉiuj radioamatoroj havas voksignojn en la etero, per kiuj oni povas ekkoni ilin en la unua alvoko. LS/BIZ/HE

### Kurso por hungaraj radio-amatoroj

La hungara revuo „Rádiótechnika" ekde n-ro 10/85 publikigas Esperanto-kurson por radio-amatoroj. La aútoro de la serio estas Gábor Jahn Deák (voksignalo HA S AF). J. Hamann

### Diskriminacio. Prelegaro el la 65a Universala Kongreso de Esperanto. Universala Esperanto-Asocio. Rotterdam 1984, 175 p.

La volumo entenas la tre interesan materialon de la Universala Esperanto-Kongreso 1980 en Stockholm, kiam konsiderinde multaj kongresanoj aúskultis prelegojn pri la diversaj aspektoj de diskriminacio kaj mem partoprenis en multaj grupoj. La volumo i. a. entenas la enkondukan prelegon de J. C. Wells „Sisteme maljusta konduto kontraú difinita homgrupo" kaj „Lingvo kaj socia identeco" kontibuoj de Guy Hérand pri diskriminacio de etnoj, la IKU-prelegon de W. Bormann „Diskriminacio pro hejmlando" kaj aliajn kontribuojn. Tre interesa kaj pensostimuliga materialo. D. B.

# Novaĵoj de Radio Polonia

**Ĉu vi scias, ke . . . ?**

— En la ĉiusemajna programo de la E-elsendoj troviĝas magazino Esperanto-ekspreso, en kies kadro oni i. a. prezentas informmaterialojn pri la E-movado disponigatajn de la organizantoj. Oni informas ankaŭ pri la okazontaj E-aranĝoj. Raportistoj de la E-Redakcio vizitas diverslandajn E-aranĝojn kaj poste prezentas son-raportojn, intervjuojn k. t. p.

— Unu el la karakterizaj trajtoj de la elsendoj estas diskutoj kun aŭskultantoj aŭdigataj kadre de la „Radio-Forumo". La plej nova diskuttemo, kiu naskiĝis ĉe la fino de la Junulara Jaro estas „Kiel altiri junularon al la E-movado?". La Redakcio volonte akceptos ideojn, sugestojn, proponojn pri la temo, kiujn oni sendu laŭ la kutima adreso.

— Lige kun la Jubileo de Esperanto apartan atenton oni dediĉas al la agado ligita kun la 100-jariĝo. Tial informoj de la respondeculoj, organizantoj k. t. p. de la jubileaj aranĝoj estas tre bonvenaj. Per la vasta prezento de la diversaj iniciatoj la Redakcio volas kontribui al la rapida spert-interŝanĝo, kiu antaŭenigos la aferon de Esperanto. Se vi sendas ian raporton al via E-gazeto, la kopion nepre sendu al Radio Varsovio.

— Kadre de la E-elsendoj de Varsovio estas aŭdigata ĉiusemajne speciala programero por komencantoj/progresantoj. Dimanĉe je la 15,30, 19,30 kaj 21,30 laŭ la universala tempo oni aŭdigas 5-minutan tekston, skribitan per facila lingvaĵo, kiun tre malrapide laŭtlegas spertaj parolistoj. Oni popularigu ĉi tiun rubrikon inter la kursanoj kaj ankoraŭ nespertaj movadanoj.

— En multaj E-kluboj minimume unu fojon monate oni organizas vesperon de E-lingvaj radioelsendoj kun prezentado de fragmentoj de E-elsendoj registritaj per magnetofono, interŝanĝo de spertoj pri pli efika akceptado de radioondoj k. t. p. Ni volus fondi ĉe ni adresaron de tiaj E-kluboj por helpi ilin ankaŭ per presitaj informiloj. Oni do sendu ĉi-koncernajn informojn laŭ nia adreso: Radio Polonia, Esperanto-redakcio, AL · Niepodległości 77/85, Pl-00-950 — Warszawa.

**Opinioj pri la tradukado**

— Ne vorton per vorto, sed sencon per senco.
Sankta Hieronimo, 4a jc.

— Traduki ne vortojn, sed la sencon.
G. Waringhien

— La tradukado estas unuavice logika kaj ne lingva agado.
L. Tarnóczy, hungara tradukisto

— Por originala verkado necesas nur laboro plus talento. Por tradukado, aliflanke, necesas laboro, talento, dulingveco, gusto, la kapablo interpreti alies verkojn intime kaj kompreneme kaj antaŭ ĉio altgrada semantika sentemo. W. Auld

— Reguloj de la tradukado:
Unua. Kompreni la tradukotaĵon. Antaŭ ol traduki tekston, havigu al vi fidindan eldonon de ĝi, se eble kun notoj aŭ komento kaj la necesajn laborilojn [gramatiko, filologia vortaro], kiuj ebligos al via kompreni ĝustan senocon de la facilaj lokoj. Dua. Neniam publikigu tradukon, eĉ deklinian, kiun vi ne kontroligis per klera alilingva esperantisto.
Tria. Por elprovi viajn fortojn, traduku specojn jam tradukitajn de famaj esperantistoj kaj komparu, detalon post detalo, vian laboron kun ilia verko; nur per imito akiriĝas kvalito. G. Waringhien

— Sed la tradukado estas tiel diable malfacila arto . . .
Se la tradukotaĵo aperis jam en aliaj naturaj lingvoj kaj la tradukanto scipovas ankaŭ ilin, li havigu al si la koncernajn tradukojn.
F. de Diego

Kolektis
**D-ro István Nagy**

## Elementa gentileco: respondi!

„der esperantist" havas regulan paĝon kun koresponddeziroj. Ni volonte publikigas koncernajn petojn senpage, supozante, ke la anoncintoj ja volas korespondi. Bedaúrinde ne malofte la redakcion atingas leteroj de eksterlandanoj kun plendo pri nerespondo de anoncintoj.

**Nu — kompreneble ofte okazas, ke unu anoncinto ricevas pli da leteroj ol li/ŝi povas utiligi por korespondado. Tamen, al elementa ĝentileco apartenas, ke oni almenaú sendu bildkarton kun mallonga informo, ke korespondo ne eblas. La ricevinto de la poŝtkarto estas pli konsolata ol se li/ŝi ricevas neniun reagon. Pensu pri vi, se vi vane skribas nericevante respondon . . .**

## Pri Bad Saarow en „El Popola Ĉinio"

En n-ro 4/1986 de „El Popola Ĉinio" (p. 24 — 26) aperis tre simpatia kaj ampleksa artikolo de Li Shijun, vicĉefredaktoro de EPĈ, membro de la Akademio de Esperanto kaj de la prezido de Ĉina Esperanto-Ligo. La aútoro priskribas siajn impresojn lige al sia restado en GDR fine de 1985, kiam s-ro Li partoprenis la internacian seminarion pri metodiko en Bad Saarow.

## Por citremuloj

Interesiĝantoj pri hungaraj folklora muziko kaj citroj kontaktu la Amikan Rondon de Citremuloj (Citerabárátok Klubja) 1106 Budapest X, strato Porcelán 4, Kulturdomo Sigmund Móricz.

## Country-muzika grupo el ĈSSR: Barbuloj

Ĉe Ĉeha Esperanto-Asocio ekzistas sesmembra muzikgrupo, kiu specialiĝas pri Country-muziko (vakeraj kaj popolaj kantoj kaj muzikaĵoj). Ili nomiĝas „Barbuloj".
La grupo estas tre taúga ankaú por humorplenaj dancvesperoj. La „Barbuloj" volonte muzikos dum via aranĝo. Por ekscii la kondiĉojn oni skribu al Ĉeha Esperanto-Asocio, Jilská 10, ĈS-110 00 Praha 1.

## Prospekto de ĈEDOK

La Ĉehoslovaka vojaĝagenteje ĈEDOK eldonis koloran prospekton en Esperanto. Ĝi estas mendebla: ĈEDOK, Na prikopê 18, ĈS-11135 Praha 1.

## Broŝuro pri kooperativismo

„Por plialtigo de la scienca nivelo de la kooperativaj agadoj" nomiĝas la 19paĝa broŝuro de Nikola Valev kaj Julia Delceva-Pejkova, kiun eldonis en Esperanto la Centra Kooperativa Unuiĝo Centro, Sofio 1985. Interesuloj pri la kooperativa movado ricevos la broŝuron senpage. Ili skribu al Bulgara Esperantista Asocio, Kooperativa Esperantista Sekcio, Bulv. Ĥristo Botev 97, Sofio/Bulgario.

## ALVOKO AL KUNLABORO

Por ke „Voĉo de Handikapuloj" ne estu plorkolektanto aú nur helpkrio de malavantaĝuloj ni petas ĉiujn verkemajn homojn, kiuj havas intereson por handikapuloj kaj handikapulojn mem, ke oni kunlaboru en nia gazeto, kiu deziras pritrakti subajn temojn el pluraj vidpunktoj:
1. Diferenco inter la denaska kaj la poste trafita handikapiteco;
2. Handikapita korpo kaj kreaj potencoj;
3. Handikapulo — sana homo;
4. Socio, medicino, ekonomio kaj handikapitaj homoj;
5. Esperanto — handikapuloj.

Viaj kontribuaĵoj pri supraj temoj devas esti de du ĝis maksimume tri paĝoj, tajpitaj kun interspaco kaj marĝenoj, en bona lingvo. La materialon bv. sendi al adreso:
„Voĉo de Handikapuloj", red. Dušan Adnadj, Školska ul. 25, YU-56227 Borovo, Jugoslavio.

## Klerigista grupo en Budapeŝto

En Budapeŝto de tri jaroj funkcias esperantista grupo de klerigistoj. Ili laboras en diversaj terenoj de kulturo. La anoj de la grupo organizis jam Konferencon pri publika klerigado, kiun partoprenis prelegantoj el ses landoj, ankaú neesperantistoj. La grupanoj regule tradukas el Esperanto hungarajn artikolojn pri publika klerigado aperintajn en Esperanto-revuoj ricevintajn de esperantistaj fakuloj. Tiujn artikolojn ni aperigis en hungaraj fakaj revuoj kaj eventuale en libroformo kiel artikolkolektajo.
La grupo petas kontaktigi ĝin kun fakuloj/aú interesiĝantoj/laborontaj en kultura teren:no — en diversaj kulturaj institucioj ekz.: kulturdomoj, sciencpopularigaj institucioj, amaskomunikiloj kun kulturaj agantoj, klerigistoj, ĵurnalistoj, kun kiuj ĝi povas interŝanĝi spertojn skribe, kaj dum spertvojaĝoj persone, aú dum la dua simpozio, kiun organizos la Klerigista Grupo de HEA en 1987 inter la 11-a kaj 16-a de marto en Budapeŝto.
La tempo de la simpozio estos: „La ebloj de la publika klerigado en la malpliigo de kulturaj malegalecoj". Oszkár Princz

## Felix Garcia Blázquez: Skizo por racia teorio de vortigado. Karako 1985. Eldonita de la aútoro, 71 p.

La aútoro klopodas prezenti problemojn de la vortfarado de Esperanto sur tri diversaj niveloj. Sur la elementa nivelo li komparas la elementojn de la Esperanto-vortfarado kun la hispana. La komparoj maloftiĝas sur la „meza" kaj mankas sur la „supera" nivelo. La aútoro kritikas la regulojn de la vortfarado akceptitaj de la Akademio de Esperanto. D. B.

## Hubert Weinzierl: Nachklänge. Resonoj. Trad. Eckhard Bick. München: Natur und Umwelt Verlag GmbH 1985.

Kolora fotolibro kun naturmotivoj kaj poemoj engaĝitaj por la konservo de la natura medio de la homo. Tre belaj poemoj kun bona traduko. 62 p.

# GRANDA FAKA BIBLIOGRAFIO DENOVE HAVAS ESPERANTAN SEKCION

Verŝajne la plej granda kaj kompleta jara bibliografio de verkoj pri la lingvo kaj literaturo de Esperanto estas tiu, kiu aperas en **MLA International Bibliography of Books and Articles on the Modern Languages and Literatures.** Jus aperis tiu giganta kompilajo por la jaro 1984. En kvin volumoj, la verko listigas iom pli ol 43 000 sciencajn artikolojn kaj librojn, kiuj aperis dum la jaro, en la jenaj fakoj: (1) Literaturoj de la Brita Insularo, Brita Komunumo, Angla Karibio kaj Usono; (2) Eúropa, Azia, Afrika kaj Sudamerika Literaturoj; (3) Lingvistiko; (4) Ĝenerala Literaturoj; (5) Folkloro.

La plej granda koncentriĝo de verkoj en kaj pri Esperanto aperas en la tria volumo, en sekcio nomita „Helpaj lingvoj, internaciaj lingvoj." Eroj 9524 — 9537 listigas verkojn pri interlingvistiko ĝenerale. Eroj 9540 — 9795 konsistas el verkoj specife pri la lingvistiko de Esperanto. Poste sekvas eroj 9796 — 9810 pri aliaj projektoj de internaciaj lingvoj.

Tiu ĉi sekcio estas tamen nur parto de la tuto. Dise tra la volumaro, precipe en la dua kaj kvara volumoj, aperas pliaj eroj Esperantaj. Ili estas troveblaj per amplekssega temoindekso de 2992 kolumnoj sur 1496 paĝoj, kiu sendas la uzantojn al Esperantaj verkoj en aliaj partoj de la bibliografio. Ĉio kune donas bonan superrigardon de la laboro de niaj esperantologoj dum la koncerna jaro.

Por ĉiu ero aperas bazaj bibliografiaj informoj (titolo, loko de apero, eldonejo, paĝonombro por volumoj; titolo, titolo de la periodaĵo, volumo, numero, paĝoj por artikoloj). Tiujn informojn generas komputila sistemo, kiu konservas ne nur tiujn bazajn informojn, sed ankaú amason de aliaj detaloj pri la koncerna verko. La komputilo notas ekzemple la lingvon de la verko, kaj (per kelkaj ŝlosilaj vortoj) la bazan enhavon. Ĉe lingvistikaj verkoj, ĉio ektas klasifita laú subfakoj (gramatiko, sintakso, morfologio, leksiko, pragmatiko, socilingvistiko, psikolingvistiko, ktp.), aú laú sia rilato al aliaj fakoj (lingvistiko kaj politiko, lingvistiko kaj matematiko, ktp.), aú laú sia historia periodo aú geografia situo aú rilato al gravaj fakuloj aú skoloj.

La giganta laboro de kompilado (por ĉiu ero necesas plenigi dupaĝan formularon plenan je bibliografiaj kaj indeksaj donitaĵoj) estas farata de teamo de 160 personoj, plejparte usonaj universitataj fakuloj. Respondecaj pri la fako „Kunmetitaj kaj derivitaj lingvoj kaj alia komunika konduto" estas d-ro Humphrey Tonkin kaj d/rino Jane Edwards, el Ŝtata Universitato de Novjorko, kaj nederlanda kunlaborannto d-ro W. A. Verloren van Themaat. D-ro Tonkin regule vizitadas la Bibliotekon Hodler de Universala Esperanto-Asocio, en Rotterdam, por fari la kompilan laboron. Aliaj eroj estas kolektataj aliloke, kaj ankaú aliaj teamanoj aú funkciuloj de MLA aldonas erojn trovitajn en aliaj laborterenoj.

La bibliografio de MLA, Modern Language Association of America, havas longan historion. Inter specialistoj pri anglalingva literaturo ĝi estas nepre la plej prestiĝa kaj konata (kaj kompleta) kompilajo. Ĝi ankaú ĝuas bonan reputacion inter fakuloj pri aliaj eúropaj literaturoj kaj inter specialistoj pri lingvistiko. Malgraú la longa historio, nur per la volumo de 1979 komenciĝis la kunlaboro de esperantistoj. En tiu jaro d-ro Verloren van Themaat aliĝis al la kompilantaro, kaj la nombro de eroj en la sekcio „Internaciaj lingvoj" kreskis de 5 en 1978 al 120 en 1979. En 1980 Humphrey Tonkin aliĝis. Okazis salto al 233 eroj. En 1981 enkondukiĝis la nuna komputila sistemo por la bibliografio, kaj de post tiam la koncerna sekcio montras la jenan profilon:

| | |
|---|---|
| 1981 | 278 eroj |
| 1982 | 253 eroj |
| 1983 | 241 eroj |
| 1984 | 286 eroj |

Eroj ellasitaj en difinita jaro estas aldoneblaj en postaj jaroj.

Estas kompreneble tre grave, ke esperantologoj kaj aliaj fakuloj ja konsultu la bibliografion, kaj ankaú atentigu la kompilantojn pri mankantaj eroj. La potencialo de la bibliografio estas grandega — interalie pro tio, ke ĝi estas nun komputile alirebla kaj sekve traserĉebla — kaj ni estas bonŝancaj, ke MLA pretas dediĉi tiel detalan atenton al nia fako (pli detalan ol ĉe kelkaj aliaj fakoj). Tamen, ne temas pri tio, ke MLA faras komplezon al Esperanto, sed ke esperantologio kaj la lingvo Esperanto estas akceptataj samrange kiel aliaj fakoj kaj lingvoj.

La adreso de d-ro Tonkin, al kiu oni sendu kompletigojn kaj atentigojn pri eraroj aú mankoj, estas: Office of the President, State University College, Potsdam, NY 13676, Usono.

H. Tonkin

Jen la mankinta leono!
En de 3/86, p. 60, ni raportis pri la Esperanto-Klubo de Leipzig kaj menciis leonon, kiu tamen ne trovis lokon en la postredaktfina infomro. Sed jen, ĝi stele okulumas post sukcesa malfermo, okazinta la 13-an de septembro 1986, i. a. kun prelego de D. Blanke pri la 71-a UK-o en Pekino.

# En lingvoscienca bibliografio de GDR

La Centra Instituto por Lingvoscienco ĉe la Akademio de Sciencoj de GDR eldanadas serion de kajeroj kun resumoj, referaĵoj kaj bibliografiaj informoj. Ĝi nomiĝas „Sprachwissenschaftliche Informationen" eldonata de Akademie der Wissenschaften der DDR, Zentralinstitut für Sprachwissenschaft (Zentralstelle für sprachwissenschaftliche Information und Dokumentation) kaj aperas jare per 2 kajeroj. La gvida redaktorino estas d-rino Irmtraud Jüttner. En la kajeroj de la lastaj jaroj sporade ankaŭ aperis informoj pri interlingcistikaj publicaĵoj. Ekde 1985 la serio havas novan profilon. La serio ekde nun koncentros sian atenton je la bibliografia fiksado kaj storado de la rezultoj de la lingvistiko de GDR, kia ili aperas en GDR kaj eksterlande. Ĉiujare aperas 2 kajeroj „Bibliographie zur Sprachwissenschaft der DDR" (bibliografio pri la lingvoscienco de GDR). Por la serio la prilaborantoj ellaboris apartan klasifon kun 30 ĉefaj ĉapitroj kaj multaj subĉapitroj. Por la registrado de publicaĵoj en GDR pri interlingvistiko kaj esperantologio estas aparte interesaj la ĉapitroj: 0. bibliografio, 9. lingvopolitiko, 22. planlingvoj, 27. personaĵoj, 28. konferencaj raportoj, 29. noveldonoj, 30. recenzoj. Inter la multaj revuoj, kiujn oni regule tralaboras, ankaŭ troviĝas „der esperantist" kaj la GDR-eldono de „Paco", ĉar en ambaŭ periodaĵoj regule aperas fakaj artikoloj.

La unuaj du kajeroj (9/I kaj 9/II, Berlin 1985, 158 p. + 160 p.) entenas la bibliografion por 1984. La kajero 10 (1986) entenos la indikojn por 1985 kaj kompletigan ĉapitron por 1984.

La kunlaborintoj de la bibliografio por 1984 enprenis sufiĉe multajn bibliografiajn indikojn pri interlingvistiko kaj esperantologio sub la ĉapitroj 0. bibliografio (1 indiko), 22. planlingvoj (12), 27. personaĵoj (7), 28. konferencaj raportoj (6), 29. noveldonoj (1), 30. recenzoj (7) kaj mencio de la doktoriga disertacio de Sörgel (kp. „der esperantist" 126/4/1984), sume 35 indikoj.

Por la kajeroj 1985 kaj sekvaj mi mem kunlaboros rilate al planlingvoj (Esperanto). La kajeroj estas mendeblaj ankaŭ en eksterlando. Interesuloj el la nesocialismaj landoj mendu ĝin pere de la kutimaj internaciaj librovendejoj. Interesuloj el socialismaj ŝtatoj mendu pere de la „librovendejoj por fremdlingva literaturo". Se ekaperos malfacilaĵoj, oni kribu al Buchexport, Leninstr. 16, Leipzig, DDR — 7010. Interesuloj el GDR rekte mendu ĉe Zentralstelle für sprachwissenschaftliche Information und Dokumentation, DDR — 1100 Berlin, Prenzlauer Promenade 149—152.

Kajero kostas por GDR-anoj 4 markojn, por mendantoj el eksterlando 10 markojn. Vere valora materialo. D. Blanke

## Ryszard Rokicki (Red.). Acta Interlingvistica. 12a Scienca Interlingvistika Simpozio. Varsovio. 27. 4. — 1. 5. 1984. j. Varsovio: Akademickie Centrum Interlingwistyczne. 1985, 187 p.

Inter la malmultaj interlingvistikaj seminariaj serioj sendube elstaras la Sciencaj Interlingvistikaj Simpozioj en Varsovio pro la plej longa tradicio, ĝia internacieco kaj pro ĝiaj studentaj radikoj. Ĉiujare 30 — 40 interlingvistikemuloj dum 3 plenaj tagoj debatas konvencie kaj nekonvencie pri tradiciaj kaj netradiciaj aspektoj de la vasta interlingvistika problemaro. Aperis jam la unua volumo de la Acta Interlingvistica (kp. de 1/86). La dua entenas 12 referaĵojn prezentitajn dum la 12a SIS 1984, kiun partoprenis 42 personoj el 8 landoj. E. Symoens argumentas, ke la interetna lingvo estas rezulto de historiaj procezoj. W. A. Verloren van Themaat analizas la kaŭzojn de la malkonsento pri la strukturo kaj celoj de planlingvoj. Demandante pri lingvaj kriterioj de internacieco P. Janton demonstras, ke Esperanto kapablas reprodukti — laŭ generativgramatika kompreno — plurajn suprajn strukturojn responde al iu difinita profunda strukturo (t. e. ebeno de lingvaj universalaĵoj). T. Ejsmont prezentas, laŭ mia kompreno, interlingvistikan temon en sia larĝeco traktante pri (nova) „internacia komunika ordo". Por ŝatantoj de la (ja vere jam eksmoda) genera gramatiko D. Maxwell prezentas modelon pri Esperanto. M. Duc Goninaz tuŝas gravajn problemojn de la ĝis nun forte subtaksita problemaro de la normo de Esperanto. Pri la vortakcento de Esperanto, ŝajne unuan fojon tiom detale kaj diferencite, traktas R. Rokicki, prave akcentante, ke ja la problemo ne estas tiom simpla, kiel ĝenerale prezentite. Tamen, oni ne falu en la kaptilojn de la malfacilaj prozodiaj priskriboj de etnolingvoj. F. Lo Jacomo tuŝas problemojn de facileco de Esperanto montrante, ke tamen la lingvo ne estas tiom facilega. H. Frank skizas rilatojn inter interlingvistiko (laŭ lia kompreno) kaj kibernetiko kaj 0. Kalter informas pri problemoj de vortfarado en DLT. Interesaj por interlingvistiko, pro la elemento de konscieco, estas la argotoj (sekretaj lingvoj), pri kiuj skribas J. Pstrusinska. La plej interesa kontribuo de la volumo por mi estas „Specifeco de fonaj scioj de la personoj uzantaj Esperanton" de Aleksander Melnikov (Soveta Unio). Melnikov unuafoje liveras tre taŭgan materialon pri tiu sciaro kunliganta la Esperanto-komunumon, kiu kvazaŭ konsistigas la komunan kulturan kaj spiritan bazon kaj tiel ebligas internacian altnivelan funkciadon de la lingvo. Lia studo liveras multajn respondojn al tiuj, kiuj daŭre turmentas sin por la problemo, ke ja la Esperanto-movado ne havas komunan miljaran kulturan bazon kaj sekve ne vere povus funkcii kiel lingvo k. t. p. Estas tre dezirinde, ke Melnikov plu prilaboradu la temon.
Espereble baldaŭ sekvos plua volumo de la Acta Interlingvistica. D. Blanke

## Laste aperis
### (nur bibliografio, ne librooferto!)

— Argentina novelaro, div. aŭtoroj. El la hispana trad. (1978, 1980, 1982) diversaj. Laroque Timbaut: Cercle espérantiste de l'Agenais, 1982 (2a eld.). 43 + 61 + 48 p. Mimeo. SAT-Broŝurservo. Tri serioj de entute 18 noveloj de 15 aŭtoroj, kun notoj.

— Ĉeĥa literaturo en Esperanto/Česká literatura v esperantu; Esperantaj verkoj far ĉeĥaj aŭtoroj/Esperantská díla českých autorů; Bibliografio 1890 — 1980 Bibliografie, komp. Vlastimil Novobilský (1934). Prago: Ĉeĥa Esperanto-Asocio, 1983. 30 p. 21 cm. Dulingva: Esperanto-ĉeĥa. Alfabete ordigitaj listoj de verkistoj, kun detaloj pri la eldonaĵoj kaj indeksoj de tradukintoj, ilustrintoj, titoloj kaj eldonjaroj.

— Elektitaj rakontetoj de Esperanto/Shijieyu xiao gushi xuan, de Wei Wenming. Ŝanhajo: Shanghai Waiyu Yinxiang Chubanshe, 1983. Tridek rakontoj kun vortklarigoj, notoj, demandoj kaj respondoj por ĉinaj progresantoj.

— Esperanto: Shijieyu sanbai ju, de Wei Yuanshu (1935). Ŝanhajo: Shanghai Waiyu Yinxiang Chubanshe, 1983. 2 + 79 p. 18 cm. Konversacia gvidilo por ĉinoj, kun Esperanta-ĉina vortareto.

— Formo kaj sono, red. Ilona Koutny kaj Péter Broczkó. Budapeŝto: Hungara Esperanto-Asocio, 1985. 64 p. Ilus. N-ro 7 de Internacia komputado. ISBN 963 571 152 2. Dek tri artikoloj pri aspektoj de la formo kaj sono rilataj al komputado, mallongaj diverslandaj novaĵoj, sekcio pri mikrokomputiko, leteroj kaj anoncoj.

— Komputada baza terminaro, G. Kalckhoff, A. C. Pick k. a. Hamburgo: Deutscher Esperanto Bund, 1985. 52 p. 21 cm. 369 numeritaj terminoj en kvar lingvoj, alfabete troveblaj laŭ Esperanto, la angla, franca kaj germana. Ĉiu termino havas Esperantan difinon.

— Lenz, Georg Büchner (1813 — 1837). El la germana trad. R. Haupenthal. Saarbrücken: Artur E. Iltis, 1985. 26 p. 21 cm. Jubilea Eldonserio 2: Beletro tradukita 11. Rakonto pri la vivosorto de Michael Lenz (1751 — 1792), bazita sur moderne esplorita teksto (1984).

— Matematika terminaro, Daniela Deneva. Sofio: Bulgara Esperantista Asocio, 1985. 160 p. Mimeo. 20 cm. 753 terminoj en tri lingvoj, alfabete troveblaj laŭ Esperanto, la bulgara kaj rusa; kun bibliografio.

— Nomaro de britaj birdoj eksterdomaj/ British Bird Names (Outdoor Birds) (1985), komp. Edward Ockey (1913). Barnstead: Mondlingvaj libroj, 1986 (2a eld.). 15 p. Mimeo. 21 cm. Alfabete ordigita laŭ la anglaj nomoj kun ekvivalentoj de la 272 specioj en Esperanto, la latina, franca kaj germana; kun bibliografio.

— Matematika terminaro Esperanto-angla-franca-sveda komp. Chister O. Kiselman. Uppsala: Matematika Instituto de Upsala Universitato, 1985. 4 + 30 p. 30 cm. Mimeo. Raporto 1984: 14. Ĉirkaŭ 160 terminoj; kun antaŭparolo, fontindikoj, bibliografio, listo de mallongigoj kaj aldono pri operacioj kaj ties rezultoj.

— Tri noveloj, J. von Eichendorff (1788 — 1857). El la germana trad. R. Haupenthal. Würzburg: Eichendorff-Gesellschaft, 1985. 184 p. 15 cm. ISBN 90 6336 035 5. La popularaj noveloj „La marmora statuo" (1819), „La kastelo Dürande" (1837) kaj „La kidnapo" (1839) de signifa poeto de „la alta romantiko".

— Anaseto kaj koketo, adaptis Húang Ĝunúan. El la ĉina. Pekino: Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1985. 27 p. Kolorilus. de Ĉu Ĉuan. 19 cm. Tri rakontoj por junaj infanoj.

— Biografia leksikoneto de la japana Esperanto-movado, Tanaka Sadami, Mine Yositaka, Miyamoto Masao. Osaka: Japana Esperanta Librokooperativo, 1984. 120 p. 18 cm. Japanlingva konsultlibro.

— Duagrada kurso de Esperanto/Tu' hoc trung câp quôc tê ngú Esperanto, Nguyên Công Môn k. a. Xuât Bán/Budapeŝto: Hôi Quôc Tê Ngú Bao Vê Hòa Binh/ Hungara Esperanto-Asocio, 1983. 107 p. Ilus. 20 cm. ISBN 963 571 097 6. Informaj artikoloj en la vjetnama, gramatikaj klarigoj kaj vortlistoj Esperantaj — vjetnamaj.

— Germana antologio (ekde la plej frua epoko ĝis ĉ. 1700). El la germana trad. W. Hermann kaj H. Rössler; red. 0. Brecht. Gerlingen: Eldonejo Bleicher, 1985. 327 p. Ilus. 19 cm. ISBN 3 88350 503 X. Impona kolekto de tradukoj el la Frugermana epoko, La tempo de la karolidoj kaj otonidoj. La tempo de la trobadoroj, La malfrua mezepoko, Renesanco kaj humanismo, La Reformacio, La Baroko; kun enkonduko al ĉiu sekcio.

— Historio absolvos min, La, Fidel Castro (1927). El la hispana trad. Kuba Esperanto-Asocio. Havano: Eldonejo José Marti, 1984. 62 p. 21 cm. Fama parolado farita en la proceso Moncada kaj fariĝinta programo de la kuba revolucio.

— IFEF-historio 1909 — 1984. Lindhorst (FR Germanio): Internacia Fervojista Esperanto-Federacio, 1984. 80 + folio. Ilus. 22 cm. Aŭtoritata, riĉe ilustrita kaj detala historio pri la fervojista Esperanto-movado.

— Lidia; The Life of Lidia Zamenhof; Daughter of Esperanto, Wendy Heller. Oksfordo: George Ronald, 1985. 260 p. Ilus. 24 cm. ISBN 0 853 98 1949. Aŭtoritata anglalingva biografio pri Lidia Zamenhof (1904 - 1944), filino de la iniciatinto de Esperanto; kun 60 ilustraĵoj; fontoregistro kaj indekso.

— Lingvaj aspektoj de Esperanto, Bruno Migliorini (1896 — 1975). Pisa: Edistudio, 1985. 93 p. 22 cm. Bind. ISBN 88 7036 033 9. Sep eseoj de konata lingvisto pri esperantologiaj kaj interlingvistikaj temoj.

— Maks kaj Morits; Knaba rakonto en ses bubaĵoj (1864), Wilhelm Busch (1832 ĝis 1908). El la germana trad. Rudolf Fischer. Bad Hersfeld: Deutscher Esperanto-Bund, 1985. 34 p. Kolorilus. 19 cm. ISBN 3 88547

273 2. Amuza, klasika, abunde ilustrita poemo por infanoj, de unu el la fondintoj de la germana bildstria arto; kun biografio pri la aútoro kaj apendico kun la germana kaj Esperanta tekstoj apudmetitaj.

— Mia spektro (1938), Nikolao Kurzéns (1910 — 1959). Toronto: Esperanto-rondo, 1985 (2a eld.). 131 p. Ilus. 19 cm. ISBN 099186 270. Nikolajs Kurzéns estis poeto de la pesimismo, „majstro de la eta tormo". Krom la 59 poemoj de la originala eldono, aldoniĝis ceteraj verkoj de Kurzéns: 38 poemoj tradukitaj de li el la latva kaj naú liaj latvalingvaj poemoj en Esperanto de Elvira Lippe; kun enkonduko de William Auld kaj biografiaj vortoj de Mirdza Burgmeister.

— Naturo kaj socio; Enkonduko en ekologian pensadon kaj agadon (1984), Edgar Guhde (1936). El la germana trad. W. Gunther, C. Noll, G. Grunder, Paderborn: Esperanto-Centro, 1985. 169 p. 21 cm. ISBN 3 922570 40 2. Didaktika prezento de la politika ekologio: la rilatoj inter la industrisocio kaj naturmedio, i. a. per resumoj, demandoj kaj taskoj; kun glosaro kaj bibliografio.

— Nudpieda Gen, Nakazawa Kiezi. El la japana (1982) trad. Izumi Yukio. Tokio: Rondo Gen, 1985 (2a eld. reviziita), 4 + 284 p. 21 cm. Bildstria romano pri familio, kiu spertis la eksplodon de la atombombo super Hirošimo en 1945. Unu el la plej famaj kontraúmilitaj libroj en Japanio, kie ĝi estas ankaú filmita kaj operigita. Bele eldonita, ĝis nun la plej ampleksa bildstria libro en Esperanto; Esperanta Infanlibro de la Jaro 1983.

— Pledo por unueca lingvo, Rikardo Šulco (Richard Schulz, 1906). Paderborn: Esperanto-Centro, 1985. 287 p. 21 cm. Bind. ISBN 3 922570 42 9. Artikoloj, eseoj, recenzoj, leteroj ks. pri la lingvouzo de Esperanto.

— Postrikolto de ludovikajoj. Iam kompletigota plena verkaro de L. Zamenhof, kajero 10. Kioto: Eldonejo Ludovikito, 1985. 307 p. 22 cm. Bind. Skribajoj ĉefe leteroj de kaj al Zamenhof — Indekso.

— Sciencaj Komunikajoj 1985/2; Ter-sciencoj, red. András Lukács. Budapešto; Scienca Eldona Centro, 1985. 96 p. Ilus. 24 cm. N-ro 9. Sciencaj artikoloj i. a. pri paleografio, tertremoj, arkeologio, zoogeografio, astronomio kaj minado.

— Sciencaj komunikajoj 1985/3; Komunikado, red. András Lukács. Budapešto: Scienca Eldona Centro, 1985. 96 p. Ilus. 24 cm. N-ro 10. Sciencaj artikoloj pri lingva komunikado, perkomputilaj tradukado kaj tekstoprilaboro, edukado kaj la homa cerbo, radiofrekvencaj kabloj kaj dentrada transmisio.

— 39 modernaj poetoj; Antologio de la postmilita bosnia-hercegovina poezio, komp. Ivan Kordić. El la serbokroata trad. Ladislav Režek. Sarajevo: Esperanto-Ligo de Bosnio kaj Hercegovino, 1985. 110 p. 20 cm. Okdek naú poemoj de 39 poetoj; kun antaúparolo kaj notoj pri la aútoroj.

— Trojaninoj; Ifigenia en Taúrido, Eúripido (ĉ. 480 — 406 a. K.). El la pragreka trad. Albert Goodheir (1912). Glasgovo: Eldonejo Kardo, 1985. 134 p. 21 cm. ISBN 0 905149 22 X. Du tragedioj, traktantaj la okazaĵojn, kiuj sekvis la militon de la grekoj kontraú Trojo; kun enkonduko kaj notoj.

— Tu' hoc quôc tê ngú' Esperanto; So' câp và Trung câp, Nguyên Minh Tung k. a. Budapešto/Xuât Bán: Hungara Esperanto-Asocio/Hôi Quôc Tê Ngú' Báo Vê Hòa Binh, 1983. 225 p. 20 cm. ISBN 963 571 098 4. Baza lernolibro 17-leciona por vjetnamlingvanoj, kun gramatikaj klarigoj, ekzercoj, konsiloj pri stilo kaj ekzemploj de literaturo.

— Verda estonteco, La (1978), Harry Harrison (1925). El la angla trad. Joy Davies. Dublino: Esperanto-Asocio de Irlando, 1984. 15 p. 21 cm. Sciencfikcia novelo pri imagita estonteco de Irlando.

— Bulgara Esperantista Asocio — Aktiva batalanto por paco, internacia kompreniĝo kaj socia progreso, red Dimitar Papazov. Sofio: Bulgara Esperantista Asocio, 1982. 350 p. Ilus. Mimeo. 20 cm. Referaĵoj, prezentitaj dum la konferenco „75 Jarojn BEA" (Veliko Târnovo, sept. 1982).

— Ekesto kaj celoj de la Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) San Marino, komp. Brigitte Frank-Böhringer. Dortmund: Verlag Modernes Lernen, 1986 (ne indikita). 120 p. 21 cm. ISBN 3 8080 0091 0. Plena dokumentaro, kun diversaj partoj en Esperanto, la germana, itala kaj angla.

— Esperanto-Lehrbuch/Intensa lernolibro kun Wörterbuch/Vortaro, laborgrupo „Nokta Tajpejo". Arhus/Bonn: Eúropa Esperanto-Eldonejo, 1985. 177 + 72 p. Ilus. de Uta Hasekamp. Mimeo. 21 cm. ISBN 87 85021 00 8. Kvin-leciona germanlingva lernolibro, speciale verkita por intensaj kursoj; kun legaĵoj, ekzercoj kun solvoj kaj ampleksa dudirekta vortaro.

— Horizonto de Sovetia Litovio. Vilnius: Mintis, 1985. 56 p. Mimeo. 29 cm. Naúa kajero. Kolekto de beletraj, esperantologiaj, originalaj k. a. tekstoj plejparte rilataj al nuntempa Litovio.

— Kresko de la Ekperanta vort-provizo en la unuaj tri jaroj (1887 — 1890), La, D. B. Gregor. Coatbridge: Kardo, 1986 (ne indikita). 28 p. Mimeo. 21 cm. Esploro kun statiktikoj.

— Ni parolas Esperante; Unua parto, Vladimír Němec. Žilina: Esperanto-klubo, 1984. 85 p. Mimeo. 29 cm. Lernolibro 15-leciona por slovakingvaj progresantoj, akcentanta la akiron de ampleksa vortprovizo, kun ekzercoj (sen solvoj).

— Paco kaj la sindikatoj, La (1984), Petro Djulgerov. El la bulgara trad. Nikola Aleksiev. Sofio: Centra Konsilio de Bulgaraj Sindikatoj, 1985. 48 p. Mimeo. 22 cm. Parolado de prezidanto de Centra Konsilio de Bulgaraj Sindikatoj.

— Por plialtigo de la scienca nivelo de la kooperativaj agadoj, Nikola Vâlev kaj Julia Ðelceva-Pejkova. Sofio: Centra Kooperativa Unuigo Centro, 1985. 20 p. Mimeo. 21 cm.

— Revuo Balkana laboristo — tribuno kaj organizanto de laboristaj esperantistoj en

Bulgario (1929 — 1931). Dimitar Papazov. Sofio: Bulgara Esperantista Asocio, 1983. 59 p. Mimeo. 21 cm. Historia studo kun antaŭparolo de Nikola Aleksiev; fontindikoj.

— Syntactic Tree Structures in DLT, Klaus Schubert (1954). Utrecht: BSO/Research, 1986. 211 p. Figuroj. 30 cm. ISBN 90 70730 02 2. Anglalingva sintaks-analiza studo de la sur Esperanto bazita pontolingvo de DLT (Distribuita Lingvo-Tradukado); kun bibliografio.

— Vort-statistikaj esploroj, Henri Vatré (1908). Saarbrücken: Artur E. Iltis, 1986. 41 p. Tabeloj. 21 cm. Jubilea Eldonserio: 3 Esperantologio 15. Statistikaj esploroj pri verkoj de dek kvin Esperantaj novelistoj kaj dek poetoj.

---

## Leksikono de mallongigoj de internaciaj organizaĵoj kaj institucioj.

**Heinz Koblischke: Abkürzungslexikon internationaler Organisationen und Institutionen. Leipzig, VEB Bibliographisches Institut Leipzig, 1985, 376 p.**

La libro entenas mallongigojn de pli ol 6000 internaciaj kaj regionaj, interŝtataj kaj neŝtataj organizaĵoj kaj institucioj. La nocioj estas alfabete ordigitaj laŭ la mallongigo kutima en la germana lingvo. Tiuj mallongigoj plej ofte estas anglaj aŭ francaj. La verko donas la plenan nomon de la organizaĵoj aŭ institucioj en la ĉefa lingvo kaj krome en la germana, angla kaj franca. Ofte oni indikas la fondojaron, la ĉefsidejon kaj fojfoje ankaŭ, ke organizaĵo fariĝis neaktiva aŭ ĉesis ekzisti.

Kun surprizo mi trovis neatendite grandan elekton de esperantistaj organizaĵoj kaj institucioj. Mi listigas tiujn kiujn mi trovis.

BLE — Budhana Ligo Esperantista
CED — Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo Problemo
EŜLI — Esperantista Ŝak-Ligo Internacia
IABO — Internacia Asocio de Bibliistoj kaj Orientalistoj
IEAB — Internacia Esperanto-Asocio de Bibliotekistoj
IEAJ — Internacia Esperanto-Asocio de Juristoj
IEKA — Internacia Esperanto-Klubo Aŭtomobilista
IFEF — Internacia Fervojista Esperanto-Federacio
IGA — Internacia Geografa Asocio
IKUE — Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista
ILEF — Internacia Ligo de Esperantistaj Foto-, Kino-, Magnetofono-Amatoroj
ILEI — Internacia Ligo de Esperanto-Instruistoj
ILEPTO — Internacia Ligo de Esperantista Poŝt- kaj Telegraf-Oficistaro
ILERA — Internacia Ligo de Esperantistaj Radio-Amatoroj
INOE — Internacia Naturista Organizo Esperantista
IOE — Instituto por Oficialigo de Esperanto
ISAE — Internacia Scienca Asocio Esperantista
ISAKE — Internacia Societo de Arkitektoj kaj Konstruistoj Esperantistoj
IU — Interlingue-Union
KELI — Kristana Esperantista Ligo Internacia
KES — Kvakera Esperantista Societo
LIBE — Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj
MEL — Muzika Esperanto-Ligo
MEM — Mondpaca Esperantista Movado
ORE — Ornitologia Rondo Esperantista
SAT — Sennacieca Asocio Tutmonda
SEL — Skolta Esperanto-Ligo
STELO — Studenta Tutmonda Esperantista Ligo
TEJA — Tutmonda Esperantista Jurnalista Asocio
TEJO — Tutmonda Esperantista Junulara Organizo
TEVA — Tutmonda Esperantista Vegetara Asocio
UEA — Universala Esperanto-Asocio
UL — Universala Ligo
ULI — Union pour la langue internationale IDO
UMEA — Universala Medicina Esperanto-Asocio
UMI — Union Mundial pro Interlingua

Estas rimarkeble, ke la aŭtoro ne simple nur kolektis tiujn mallongigojn. Li ankaŭ ofte indikas la fondojaron, ĉefsidejon, eventualan ĉeson de ekzisto aŭ malaktiviĝo kaj, eĉ historiajn detalojn.

Ekzemple ĉe IOE ni legas (Belgrad — Zemun, 15. 3. 1965 ĝis 31. 12. 1972), ĉe UEA oni trovas: Rotterdam/Nederlando, fondita 28. 4. 1908 en Svisio, 1947, unuiĝinta kun IEL, Internacia Esperanto-Ligo (1936).
Tre valora libro.

D. Blanke

---

## Stanislav Kamarýt: Historio de la Esperanto-movado en Ĉeĥoslovakio. Iom da historio kaj iom da rememoroj. Eldonanto: Ĉeĥa Esperanto-Asocio, Praha 1983. 1-a eldono. 256 p. kun bildo de aŭtoro, indekso de personoj.

„Sen historio oni restas sensperta infano." (G. E. LESSING)
Historio estas densigita sperto de la homaro, ĝi povas esti formanta forto. Ja estas konata la sentenco: nur tiu homo, kiu konas

# RECENZOJ

la historion, povas konstrui la estontecon. Tio ankaŭ validas en Esperantujo! Tamen la historiografio estas neglektita kampo en la Esperanto-movado. Kiom da asocioj ja disponas pri sia skribita historio?

ČEA nun elpaŝis. Instigite de la junaj partoprenintoj en la Someraj Esperanto-Tendaroj SET, Kamarýt volonte akceptis la proponon kaj fervore eklaboris sur tiu ĉi ĝis tiam ne plugita kampo. Jam en la 50-aj jaroj la verkoskeleto estis preta. Tamen pasis preskaŭ 30 jaroj ĝis kiam ĝi naskiĝis. La kaŭzoj estas troveblaj en la libro.

Stanislav Kamarýt (1883-1956), doktoro pri filozofio, estis bona konanto de Eo-movado en Ĉeĥoslovakio. Li estis kunfondinto de la Asocio kaj helpis elformi ĝin dum kelkaj jardekoj, ofte en gvidaj pozicioj. Eble en tio radikas multaj subjektivecoj en lia libro?

Sur 150 paĝoj la aŭtoro liveras abundon da materialo pri la Eo-movado en Ĉeĥoslovakio. La enhavtabelo montras 86 ĉapitrojn kaj subĉapitrojn. teksto komencas pri la fontoj de la ĉeĥa movado — kiu cetere ĉiam estas konsiderata kiel unuo el ĉeĥa **kaj** slovaka movadoj! —, prezentas al ni la ledendajn pionirojn LORENC kaj ČEJKA. La aliaj ĉapitroj sekvas laŭ la politikaj periodoj: „En la unua Respubliko"; „Dum la dua mondmilito"; „Nova rekonstruo". La posta ĉapitro konsistas el 30 paragrafoj, parte tre ampleksaj, en kiuj preskaŭ neniu faceto de la Eo-movado mankas, kiel ajn sengrava ĝi estas. Ili enhavas nekredeblan kolekton da faktoj pri instrulibroj, kursoj, vortaroj, originala kaj tradukita literaturo, Eo en la faka laboro, Eo kiel perilo en la kulturo, en la laborista movado kaj en la internacia solidareco, en religio, radio, teatro, turismo ktp. ktp.

Montegon da materialo kolektis K., ekscitaĵojn, mirigaĵojn, tute nekonataĵojn ankaŭ pri konataj personoj. Ĉu vi sciis ekz., ke la 1-an esperantlingvan programon en la mondo elsendis Ĉeĥoslovakia Radio?; ke la unua Eo-monumento de la mondo troviĝis en tiu lando?; ke la ankaŭ hodiaŭ vaste konata operkantisto RUDOLF ASMUS kunagis en esperantlingva versio de la opero „La vendita fianĉino" de SMETANA?

Treege interesa por germanaj legantoj estas la ĉapitroj pri la rilatoj inter germanaj kaj ĉeĥaj esperantistoj (ĉap. 2.3.2.5.). Sed bedaŭrinde ankaŭ ĉi tie restas multaj, eĉ gravaj, demandoj neresponditaj!
La longa vico de martiroj estas interesa fontmaterialo, ankaŭ por la eksterlanda leganto, speciale en la najbaraj landoj.

La artikolo pri „Interhelpo" estas ĝuo, ne sole pro la ĝis nun ne konataj faktoj.

K. estis unu el le plej kompetentaj konantoj pri la afero sed li ne estis historiisto. Li donis al ni eksterordinaran kolekton de materialo, ĝueblan legaĵon — sed ne „historion" de la ĉeĥa Eo-movado.

La aŭtoro evitas ĉiun klaran eldiron pri la kaŭzoj de diferencigoj en la movado. Pro tio la leganto ofte staras antaŭ enigmoj: Kial forlasis ČEJKA la movadon? Kial disfalis la movado en du asociojn? ktp. Kelkajn tro ekstremajn partojn provis glatigi la editoroj (i. a. p. 46-49). Kvankam K. kolektis amason da detaloj, eĉ superfluajn, li pretervidis vicon da gravaj faktoj, kiuj povus helpi al la leganto kompreni la interrilatojn de certaj fenomenoj (p. 24, 32, 43, 46, . . .). La aŭtoro ne nur ne heligas la internan strukturon de la Eo-movado; pli gravas, ke li ankaŭ ignoras la eksterajn konekšojn kaj kondiĉojn. Ili sole servas kiel tempa kadro; la Eo-movado ŝajnas esti izolita kaj evolui tute sendepende de io el si mem. Ekstrema ekzemplo troviĝas en ĉapitro 3 („Dum la dua mondmilito"). La aŭtoro komencas ĝin per la frazo: „La flameto de esperantismo tamen flagris dum la tuta okupacio germana." Per la sekva frazo li jam troviĝas en la bibliotekaj ŝrankoj de la kafejo Louvre (p. 76). Al la tutsocia vivo li dediĉas atenton nur, se ĝi rekte kontaktis la movadon. Tia sinteno memkompreneble kaŭzis gravajn erarojn; ekz. tiamaniere MASARYK kaj BENEŠ ŝanĝiĝas al pozitivaj figuroj sole pro la fakto, ĉar ili iam eldiris ion afablan pri Eo. (p. 169).

Similajn ekzemplojn oni ofte trovas. Tio ne meritas la epiteton „historio", kiu kapablas doni instruojn al la hodiaŭa Eo-movado, kapablas servi al la edukado de la juna generacio. La priskribo de la laborista Eo-movado, kiu ja estis grava en Ĉeĥoslovakio, restas naneca, malgraŭ la eldonistaj savoklopodoj, ĉar ĝuste tiu parto de la manuskripto „perdiĝis".

Spite al la abundaj kaj aplaŭdindaj alkroĉaĵoj la verko posedas gravajn mankojn. Finleginte ĝin la leganto restas „sensperta infano". Bedaŭrinde, ke el tiu riĉa materialo oni ne konstruis pli valoran.

La altan pretendon — esti „historio" — la libro ne povas kontentigi; pli vere ĝi estas miksaĵo de rememoroj kaj kroniko. Eble la aŭtoro mem sentis tion, ĉar li nomis la ellaboraĵon „Iom da historio kaj iom da rememoroj". Sed la eldonistoj ŝovis tiun pli trafan titolon al la loko de l' subtitolo.

Malgraŭ la supraj fakaj kritikpunktoj la libro estas grava fonto kaj konsultverko pri la ĉeĥa movado. Ĝi liveras novajn aspektojn, informojn kaj vekas scivolemon pri tiu movado.

En tio kuŝas ĝia nekontestebla valoro.
Specialan laŭdon meritas la eldonistoj por la valoraj aldonaĵoj: konciza biografio pri la aŭtoro; 50-paĝa bibliografio pri preskaŭ 570 titoloj(!); indekso pri pli ol 850 personoj(!); glosareto kaj kelkaj aliaj helpiloj. La lingvo de la libro estas flua, vigla kaj ilustra. Kelkaj malmultaj preseraroj ne ĝenas la komprenon.

Siegfried Linke

# RECENZOJ

## Strategiaj demandoj de la Esperanto-komunumo. Prelegaro el la Internacia Simpozio, Varsovio, 1984-04-24/28. Eldonis: Eldonkleriga Centro de PEA, Varsovio, 1985, 146 paĝoj.

La simpozio pri la nomita temo, okazinta en 1984, estis vere interesa kaj necesa, kaj en „der esperantist" n-ro 128 (6/1984) jam aperis dupaĝa raporto pri ĝi.

Komparante la aŭskultitajn prelegojn kun la presitaj, mi tre bedaŭras la mankon de valoraj kontribuaĵoj en la libro, speciale mi vane serĉis la prelegon de Tadeusz Ejsmont, PL, pri „Esperanto-idearo nuntempe", tiun de Zsuzsa Barcsay, H, pri „Edukaj kaj personec-evoluigaj valoroj de priesperantaj okupoj por infanoj", tiun de Vilmos Benczik, H, pri „Trajtoj kaj funkcioj de la Esperanta kulturo", tiun de Ian Jackson, GB, pri „La junularo: ĉu ĝi havas strategian rolon?", tiun de Gregoire Maertens, B, pri „Kontinueco", tiun de Helmut Klünder, FRG, pri „Generaciaj problemoj de la Esperanto-movado", kaj tiun de Waldemar Dudek, PL, pri „Psiko de la Esperanto-komunumano".

Aliflanke mi bontrovas la aldonan akcepton de la enkonduko far Jerzy Leyk, PL, kaj speciale de la artikolo far Sandor Revesz, H, pri „Esperantio — Sociologilingva meditaĵo". Valoras ĉi tie citi el la „Konkludoj" de tiu artikolo (p. 109/110), kiuj vere estas diskutindaj:

„ . . . ni devas akcepti la fakton, ke en la aktuala historia periodo la lingvo planita ekzistas en help-socio, kaj la progresado de la „afero" dependas de la kvalito de la help-socio.

La kvantocentra vidmaniero de la sinreproduktado reproduktas kontinue ĝuste la krizon de la sinreproduktado kaj gvidas al la demoraliĝo. Nur la kvalitcentra vidmaniero kapablas solvi ankaŭ la „kvantajn problemojn". (Kvalit-centreco tute ne signifas elit-centrecon: temas pri la kvalito de la kontentiĝo de la bezonoj, kaj ne pri la koncentriĝo al la bezonoj elitaj).

La trunka funkciaro de Esperantio ĝis iu limo konceptendas kiel sociologia konstanto . . .

La riĉa potencialo de Esperantio kuŝas ĝuste en la trunkeco, redukteco de ĝia limigiteco. Pro la foresto de la hardaj, determinaj sociaj faktoroj, riskoj kaj akirindoj/endoj, Esperantio liveras (potenciale) idealajn kadrojn por alternativaj modoj, stiloj kaj konvencioj de la kunvivado, por eskapiĝo (eĉ se relativa) de la hejmsocia enligiteco, por socia provadolernado, por praktikado kaj disvolvado de kapabloj kaj sociaj roloj, kondamnitaj de morto hejmsocie, por malfermi internacian dimension plurnivelan de la vivo individua, por „agoro" (centro: popolkunvenejo, merkato kt. de antikva, greka urbo) de Helsinki-spirito . . ."

Krom tiuj diskutendaj linioj, mi deziras atentigi pri la fundamentaj kaj gravaj frazoj el la prelego de Nikola Aleksiev. En ĝi ni trovas la signifoplenan subĉapitron (p. 24/25) kun la titolo:

„Ĝeneralaj formuloj pri certaj fundamentaj strategiaj demandoj

1. La landaj E-asocioj daŭre faru organizitajn klopodojn por la plua disvastigo de Esperanto en la plej perspektivajn tavolojn de la loĝantaro — la junularon kaj la mezaĝulojn.

2. Elpaŝi antaŭ la organoj de publika instruado per motivitaj proponoj pri enkonduko de fakultativa kaj kursa formo de Instruado de Esperanto en la diversajn laŭ grado kaj speco lernejojn, kreante en la universitatoj kaj ceteraj altlernejoj Esperanto-lektoratojn.

3. Prizorgi la eldonadon de konvena altkvalita instru-helpa literaturo por studado kaj perfektigo de la lingvokonoj de la esperantistaro.

4. Speciale klopodi pri preparo de kompetentaj instruistoj de Esperanto por la lernejoj kaj por la civitanaj kursoj.

5. Liveri al la amaskomunikiloj elokventajn, konkretajn materialojn rilate la praktikan utiligon de Esperanto en diversaj sferoj de la vivo.

6. Pere de esperantistaj filologoj aŭ filologojfavoraj al Esperanto publikigi en specialaj eldonaĵoj scienc-teoriajn artikolojn pri interlingvistiko kaj esperantologio. Samtempe klopodi pri fondo de specialigitaj Esperantoformaĵoj pri interlingvistiko kaj esperantologio.

7. Organizite direkti la internacian E-korespondadon al socie grava temaro kaj tiamaniere malkovri vojon al publikigo de interesaj korespondaĵoj en neesperantistaj amasinformiloj."

Mi tre rekomendas la studadon kaj pluan okupiĝon pri tiu libro kaj ties grava demandaro.

Michael Behr

---

## La Robaioj de Umar Kajjam trad. el la persa originalo G. Waringhien, Antverpeno 1984

Ĉirkaŭ 1045 naskiĝis en la nordorienta parto de Persio, en la urbo Nishâpŭr, Umar Kajjam (ankaŭ Omar chajjam, Umar Hajjam). Li estis saĝulo en matematiko, en diversaj natursciencoj, li estis juristo, filozofo kaj historiisto. — Kun multaj kunvivintoj li sentis abomenon kontraŭ la deviga kaj milita konfesiigo al la islamo. La Persoj estis la

# RECENZOJ

grandaj, senperaj sekvantoj de la greka scienca kulturo. Ilin dolorigis la katastrofa pereo de la helenisma heredaĵo. La genia saĝulo estis lerninto de la fama filozofo Avicenna kaj ano de la aristotelismo. Li kontraŭis la spiritan kaj religian subpremon kaj tial persekutis la islama mondregno fanatike la ateistan liperpensulon.

Umar Kajjam efikis kiel supra saĝulo de la astronomia observatorio kaj gvidis la komision preparinta la kalendaran reformon en la jaro 1074; la unika certa fakto el lia vivo. — Post la morto de du protektintoj li vojaĝis aventure kaj longe al Mekka, Buĥara, Samarkand. Malgraŭ la modesta kaj timema vivmaniero li verŝajne akceptis en la urbo Bagdad multe da scienculoj kaj sciaviduloj, ĉar jam la realigo de liaj antaŭdiroj discastigis la gloron kaj famecon de la saĝulo. Oni estis tiam fama pro la saĝeco, sed ne pro la propra poezio, tamen estis la poezio necesa parto de la alta edukiteco. Sed ĝi apartenis nur al la privat-intima sfero. — La Robaioj reprezentas por ni hodiaŭ unikaĵon de la granda poezio: Kvarliniaj sentencoj, kompareblaj al tiuj de Martial. Ili daŭrigis la grekan variacion, samtempe ili estas specifika orientaĵo. La 1-a, 2-a kaj 4-a versoj sonoras egalrimaj. La lasta (kvara) linio surprizas kun neatendebia fino. La aparta ritmo, vortludoj kaj la maniero de la refreno karakterizas tiajn malgrandajn verkaĵojn. Ĉiu miniaturo havas ĉarmon, spriton kaj traktas belegan, anakreonan mikrokosmon.

Kian en Eŭropo disvastiĝis buŝe la grandaj heroaj eposoj, jam deklaras la Ribaioj provoke la treon kiel paseman. Ili dubas herez la senmortecon de la amo kaj proklas la paradizon jam en la tera vivplezuro. Ili kantas sekrete la liberan esploradon. Ili demandas aroge, ĉu Dio estus atingebla al la homa intelekto kaj ĉu la mondo estus eterna aŭ kreita. Tiamaniere miksas sin epikureco kaj fuĝo en la plezursopiron, mistika ekstazo kun subigema herezo, pesimisma pensmaniero kun provoka protesto, filantropismo kun misantropismo, progresemaj duboj kun rezigna diskreteco, skeptika racionalismo kun melankolio. Malgraŭ ĉio, la poezio de Umar Kajjam reflektas la iaman persan mondon kun socipolitikaj kontraŭdiroj, ankaŭ jenaj en la interno de la homo. Kajjam mortis ĉirkaŭ 1123 en sia naskiĝurbo, kiu fine en la aventuraj historiaj tempoj ofte estis detruita de turktataraj, turkmenaj militantoj kaj de la anoj de Ĉingiz Ĥan. La tombo de la saĝulo estis ek de la jaro 1943 prizorgita.

Pli ol 30 poetoj, inter ili lernintoj de Umar Kajjam, post lia morto kolektis la Robaiojn, aliaj adeptoj kaŝis sin kun siaj propraj Robaioj malantaŭ la herezo de Umar Kajjam. Pro tio estas la aŭtora aŭtentikeco ege malklara ĝis hodiaŭ. Multaj generacioj da orientalistoj penis pro la klarigo de la vaga, ŝanĝbrilanta aŭtoro. Li ofte estis malĝuste interpretita.

Goethe honoris la noblan kaj progresivan pensmanieron, de Umar Kajjam kvankam Goethe ne dediĉis eĉ unu vorton al li en la „West-östlicher Diwan". Dum la 19-a jarcento legis vaste kaj avide la burĝa, snoba publiko la Robaiojn je la epokfarinta poezia traduko de la angla tradukisto Fitzgerald. La Robaioj apartenas jam de longe pro la batalo kontraŭ antaŭjuĝoj, kontraŭ senkonoj kaj kontraŭ ortodoksaj dogmoj al la monda literaturo. Al ĝi kontribuis inter la 11-a kaj 13-a jarcentoj Firdussi, Saddi, Hafiz, Nizami k.t.p.

Aliaj sociaj, hodiaŭaj fortoj vidas en Umar Kajjam ne iun „Voltaire de la persa poezio" (Goethe) sed iun Heine. En Irano mem oni eltrovas denove la grandiozajn intencojn de „la saĝulo de Nishâpûr".

Ekzistas merita serio de grandaj tradukoj kaj multo da scienca literaturo koncernante Umar Kajjam, precipe en Anglio, Francio, Danlando kaj en la germanlingvaj ŝtatoj. En GDR eldonejo „Inselverlag" eldonis „Sinnsprüche von Omar Chajjan" (trad. Rosen) kaj eldonejo „Rütten und Loening" eldonis „Durchblättert ist des Lebens Buch" (trad. Remané).

La sperta tradukisto de germana, franca kaj persa literaturo en Esperanton provis sin la duan fojon traduki la Robaiojn. Certe, nunfoje li havis la riĉan sperton post la kunlaboro kun Kalocsay. La tradukisto enkondukas la leganton koncize en la historion de la epoko kaj verko de Umar Kajjam kaj li komentas sian propran rilaton al la tradukita verko dum jardekoj.

Ĉu Waringhien estas unu el la plej fidelaj tradukistoj de Umar Kajjam — mi mem ne scias. Tio estas decido de fakuloj. La komparo kun la eldono el la jaro 1953 ĉe SAT kaj 1984 estus dezirebla. Malferma estas la demando pri gajno kaj malgajno.

Evidente estas ke la leganto — ankaŭ sen scio de la cirkonstancoj de la verko, epoko aŭ aŭtoro — sentas grandan plezuron legante la sopirojn de „la saĝulo de Nishâpûr".

Ingrid Erfurth

---

## Kalkhoff, Gerhard kaj Pick, Antony C.: Komputada Baza Terminaro. Alfred Schubert Linguistisches Bureau, München 1985.

En la antaŭparolo la autoroj informas, ke tiu vorareto kun 369 kapvortoj estis finverkita jam antaŭ dek jaroj. Sed pro necerteco pri bazaj terminoj (komputero/komputilo, dateno/datumo) ili prokrastis la eldonon. Kaj el tiu prokrasto fontas novaj malfacilaĵoj, ekzemple la manko de plej modernaj gravaj terminoj. Jen la dilemo de vortaristoj! Tamen tiu kajero estas tre utila por la espe-

rantistaj komputistoj, speciale pro la bonaj difinoj por ĉiu kapvorto. La difinoj kaj la aldonitaj terminoj en angla, germana kaj franca lingvoj helpas laŭsisteme envicigi, eble korekti aŭ substreki la proponitajn Esperanto-terminojn. La plej bona laŭdo por la aŭtoroj estus realigata, se la komputistoj uzus tiun vortareton kaj trovus plibonigajn proponojn el la apliko de la donita materialo. Pro tio la recenzato nun kuraĝas skribi pli detalajn rimarkojn.

**Kuraĝe kaj bone** la aŭtoroj aplikas „datenoj" anstataŭ „datumoj" kvankam oni pli ofte legas „datumoj", ekzemple en la kajeroj de „Internacia Komputado". Pri tio la futuro decidos.

**Tre trafaj terminoj** troviĝas ekzemple por 130 „interkonveneco" (Kompatibilität), 110/111 „(ne-)rekta funkciado" (offline/on-line-Betrieb), 98 „dratkonektita" (fest verdrahtet), 152 „staplada komputado" (Stapelverarbeitung), 319 „funkciadsistemo" (Betriebssystem).

**Malĝustaj terminoj** estas certe jenaj:

84 „datena skemo" (Datenflußplan), ĉar ne temas pri dateno, sed pri dateniro, do pli bone „datenira s."

86 „datena vico" (Sortierfolge), ĉar ne vico, sed vicordo, do ne pli bone: „datena vicordo"

118 „genta sistembendo" (Systemurband) ne estas biologia afero (vidu sub „genta" en , PIV) sed devas teksti „generiga - sistembendo", ĉar „generi" sub 117 jam estas difinita kiel termino.

141 „klasifiki" (sortieren) ne trafas, ĉar el ĝi ne rekoneblas la estigo de alia ordo, do pli bone: „ordigi"

303 „utileca rutino" (Dienstprogramm) estu simple „serva r."

**Malŝato de neologismoj** ne ĉiam estas virto, speciale ĝi estas malvirto, se la komputistoj jam uzas la neologismojn. Pro tio mi kritikas la tro „esperantismajn" terminojn

22 „antaŭeco" anstataŭ „prioritato" (jam tiel en PIV!),
49 „bitoko" anstataŭ „bajto",
198 „memorilo" anstataŭ „storo",
165 „konektloko" anstataŭ inferfaco",
123 „ingiĝo" anstataŭ „nestigo"

**Tro malkonkretaj terminoj** estas jenaj:
87 „datenaro" (Datei), 103 „enskribo" (Satz), 183 „loko" (anstataŭ „storloko"), 101 „enfalo" (anstataŭ „ĝenbito"), 99 „elfalo" (por manko de bito (j) ).

**Ne sisteme formita** ŝajnas al mi la sekvo de la terminoj·
63 „dateno", 103 „enskribo", 87 „datenaro", 90 datenarbanko" kun la germanaj signifoj: Daten, Datensatz, Datei, Datenbank.
La komputistoj scias, ke 63 estas elemento de 103, 103 elemento de 87, 87 de 90.
Pro tio speciale la temino „enskribo" (Datensatz) ne trafas.
Mi propanas jenan vicon:
63 „dateno" aŭ „datumo", 103 „rikordo",
87 „rikordaro", 90 „rikordarbanko = „daten/um/banko".
Krome ne sisteme estas formitaj
106 „ĉefa etikedo" (vorderer Datenkennsatz) kontraue al
107 „finetikedo" (trafa por „Hinterer Datenkennsatz) ; ĉikaze mi proponas
106 „komenca etikedo".
33 „asemblilo" mem estas programo, kiu tradukas alian programon en la maŝinlingvon. Bone, sed pro tio, tiu alia programo ne rajtas nomi 34 „asemblil-programo", sed laŭ mi nur 34 „asembla programo".

**Dubindaj terminoj,** pri kiuj la recenzinto ne certas pri trafa solvo, estas precipe la multaj „-(at)oroj", kiel ekzemple 100 „emulatoro", 113 „generatoro", 164 „koncentratoro", 180 „ligatoro", 227 „multipleksoro", 244 „operatoro", 312 „simulatoro", 262 „procezoro". Kial oni formas la terminojn ne-unuece, kelkfoje kun „-atoro", kelkfoje kun „-oro"? PIV helpas per la fakto, ke ĝi ne enhavas „-oro", sed sur p. 79:

**„-ator/o.** Vorfino en internaciaj vortoj, kun la signifoj: **1** de aganto: diktatoro, spektatoro, uzurpatoro ktp., **2** de agilo: generatoro ktp.. RIM: En tiu dua senco, — -atoro ne ĝuste sinonimas la E-an suf-on **-ilo**: ĉi tiu estas ordinare rezervita por simplaj instrumentoj uzataj per homa mano, dum **-atoro** montras pli komplikan aparaton aŭ maŝinon, funkciantan pli-malpli aŭtomate. . . . Kiam la radiko mem jam estas E-a vorto, **-atoro** aperas kiel teknika pseŭdosufikso, ekzemple en kondensatoro, oscilatoro, transformatoro ktp., laŭ kiuj ekzemploj oni povas pluformi ekz. „levatoro" (=levmaŝino) apud „levilo" kaj ceteraj.

Mi proponas, ke ni n e uzu la formon „-oro", sed nur la formoj „-atoro" aŭ „-ilo". La vortfino „-ilo" ankaŭ povu prezenti komplikan maŝinon aŭ programon, se la komplikeco jam estas esprimata per la radiko, kiel en „komputilo", „procezilo" kaj „multipleksilo".
Kiel bone, trafe kaj mallonge fiksigi la terminon kun la numero 272 (run of the programm, Programmlauf, passage machine)? La proponita „programiro" ne tute trafas, „programrealigo" estus tro longa. Ĉu eble „programlaboro", ĉar ja en tiu stato la programo kvazaŭ laboras, ĝi ja prilaboras la daten/um/ojn, ĝi ja realigas la daten/um/-prilaboron, do la komputadon.

Ankaŭ aŭtomotaj maŝinoj „laboras", kial programo ne „laboru"?

**Resume:** Tiu vortareto estas grava difinaro kaj donas multajn instigojn plue elformi la necesan fakterminaron pri komputiko.

Michael Behr

# RECENZOJ

## Rikardo Ŝulco: Pledo por unueca lingvo. Paderborn: Esperanto-Centro, 1985, 287 p.

Recenzi tiun ĉi libron estas dornoplena vojo. Mi tuj devas mencii, ke Rikardo Ŝulco estas Richard Schulz el FRG kaj ne miksebla kun Karl Schulze (Berlin/GDR), la kapala tradukinto de „Nuda inter lupoj" kaj de la „Trigroŝa Romano", kiu bedaúre jam Rikardo sis. Nu — oni devas koncedi al Rikardo Ŝulco, ke li verkas entuziasme, bataleme kaj polemike por — tio ŝajnas la de li mem elektita misio — savi Esperanton antaŭ la plena koruptiĝo, disfalo kaj degeneriĝo, savi la lingvon antaŭ evoluo registrita en Plena Ilustrita Vortaro, Plena Analiza Gramatiko kaj similaj verkoj, kiujn ja animis Kolocsay kaj Waringhien.
Sendube Ŝulco listigas aron da vere komplikaj kaj ofte diskutataj problemoj. Pri ata-ita, kvankam ekzistas akademia decido, la kvereloj daúras. Ŝulco kunkverelas. Vere, la problemo de la propaj nomoj estas ege komplika, sed en ĉiu lingvo. Prave li atakas la psikopaton Karolo Piĉ, (p. 55) kiu inventas plej strangajn kaj komplete superfluajn neologismojn. Prave Ŝulco avertas antaú la supozo, ke Esperanto estas tiel ege, ege facila lingvo. Li prave kontraúas duoblajn konsonantojn ekz. en getto, brutto, regatto. Li kritikas la diletantajn versfarantojn ja tro konatajn en Esperantio (p. 87). Kaj Ŝulco ankaú prave substrekas, ke Esperanto estas planita lingvo kaj ke ĝi estu pli forte planata. Bone, sed, sed, sed . . .
La plej grava orientilo por Ŝulco estas la „logiko", kiun li, cetere, nenie difinas. „Vere internacia planlingvo ne povas havi alian gvidilon ol la logikon" (p. 122) ni legas. Granda miro! Ĉiu lingvisto scias, ke ekzemple matematika logiko ne identas kun „lingva logiko". Ofte oni parolas pri logiko sed celas sistemecon, regulecon, analogion. Do pri kiu „logiko" temas? La strukturiĝon kaj evoluon de la lingvo influas multaj faktoroj, konvencioj, tradicio, analogio kaj certe ankaú certasence „logiko", sed ne tiom eksklузive kiel mistere kredas Ŝulco. La homa pensado estas influata per racieco, emocioj k. s. sed ne per matematika logiko. Ĉiam denove ni trovas la admiron al la 16 reguloj. „Ne modli la lingvon laú iuj arbitre elpensitaj ideoj, sed evoluigi ĝin pere de la logiko el la dek-ses-regula Fundamenta gramatiko, tio estas la ĝuste vojo. Ek al la dua jarcento! La venko estas nia!" (124)
Tiaj neklaraj, emociaj kaj admonaj frazoj svarmas tra la libro. Aparte mania estas la plena esperantigo de propraj nomoj. Ni trovas tiajn belajn esperantigojn de germanaj nomoj: Düsseldorf — Dujseldorfo, Wolfenbüttel — Volfenbutjelo, Goethe — Gojto („Goethe estas kaj restas germana verkisto, sed Gojto apartenas al la tuta Esperantistaro", p. 172). Virinaj nomoj, laú Ŝulco devas havi la sufikson -ino: Eva — Evino, Flora — Florino, Gertruda — Gertrudino, Lenora — Lenorino, Sofia — Sofino k.t.p. Sed, strange, li ne postulas Virpaúlo, Virpetro, Viralfredo . . .
Bela ludo estas la traduko de propraj nomoj, afero, kio fakte detruas la esencon de propra nomo: Harry Butler — Heĉjo Ĉefservisto, Ellen Chattham — Henjo Babilŝinko (169/170) kaj similaj kretenaĵoj. Eĉ Zamenhof fariĝas Zamenhofo, sen demandi la 16-regulan majstron . . . La klarigo de la ŝulca fenomeno estas ŝajne, ke la tre bonvolema kaj laborema aútoro fakte ne komprenas la esencon de la fenomeno lingvo. Lingvo estas socia fenomeno, ne ludaĵo. Lingvo evoluas, ĉu Ŝulco volas aú ne. Ĝi evoluos sub la influo de **multaj** faktoroj, ankaú Esperanto. Ne helpas admonado, koleriĝo, riproĉado. Oni devas registri, priskribri tiun evoluon kaj ties direkton. Jes — oni devas pli konscie influi Esperanton, sed ja en la direkto de la evoluo kaj ne kontraú ĝi. Ke tio malfacilas, mi volonte konsentas, inter alie pro tio, ĉar oni tro malmulte esploras la evoluon de Esperanto. La tuta aliro al la problemo de la propraj nomoj estas erara. Propra nomo estas propra nomo nur se ĝi estas rekonebla kiel tia, havas sian apartaĵon. Ne eblas plene uniformigi proprajn nomojn. Ili estas kvazaú ideogramoj, sonkompleksoj, karakterizaj por iu difinita persono aú geografia objekto. Ŝulco ankaú estas influita de lia erara koncepto, ke „lingvo unuarange estas parola fenomeno". Laú la evoluo tio estas prava por etnolingvoj, sed tiel absolute jam ne por Esperanto, kiu ankoraú plejofte uzatas skribe. Mi ekzemple tre insiste kontraúus kripligon de mia nomo, se oni farus el mi „Detlevo Blanko" (jam sufiĉas mia „adverba" familia nomo. Ĝi restu tia).
La libro estas skribita de tre detalscia, poliglota (multlingva) aútoro, al kiu plene mankas lingvistika (aú esperantologia) metodologia bazo. La libro montras admirindan sensistemecon. Foje pri ata-ita, sekvas ĉapitroj pri propraj nomoj, denove pri ata-ita, denove pri propraj nomoj k. s. Malfacilas orientiĝi. Sed eble necesas tiaj libroj por konscii, kiom diletante, post 100 jaroj de Esperanto, ankoraú eblas trakti la lingvon.

D. Blanke

---

## Zsigmond Móricz: Varmega kamparo. Hungara Esperanto-Asocio, Budapest 1985, 169 p. Tradukis István Nagy, lingve reviziis William Auld

Bona traduko, la preso estas preskaú sen eraroj, nur kelkfoje mankas alineoj.
Estas literatura artifiko: Sub masko de krimromano pentri per klara, konciza lingvo bildon pri socia klaso, pri la meznobelara tavolo en la hungara provinco dum la unua triono de nia jarcento. Móricz plene sukcesis. La komence priskribita societo de departementaj sinjoraj moŝtoj ĉe la rezervita tablo, societo ne alirebla kaj envie rigardata de ceteraj civitanoj, montras homojn ŝajne ne-

# RECENZOJ

interesajn laú ilia senzorga, supraja babilado. Unue nur la supozo pri okazonta krimo vekas intereson. La murdo okazas sur paĝo 18 — kaj nun portretoj relieffiĝas en siaj individueco kaj socia ligo:
Laci Avary, la hazarda viktimo, juna bienposedanto, bela, eleganta viro, nekapabla al bonaj edzin-rilatoj, ŝarĝita de ŝuldoj, responsa por sufiĉe granda servistaro, amanto tie kaj alie, amiko de samsortanoj. Lia morto malkaŝas la jam regantan kaoson en lia bieno. Vilma, la edzino de Laci kaj en streĉa rilato al li. Bela virino kaj pro tio seksa celo por multaj viroj. Kvankam indiferenta al tiuj pasioj, la famo kulpigas ŝin esti morale duba. Pupo por viroj, ankaŭ por la propra, tio ne estas vivenhavo, ŝi eltrovas, sed ne eliron. Bedaúrinde eĉ la taskon naski kaj eduki infanojn rifuzis al ŝi la sorto.
Béni Papp, ĉefpolicestro, homo, kiu konas kaj malestimas la leĝon, kiu brutale kaj cinike uzas sian potencon por propraj celoj.
Pere de la okuloj de detektivo, kruda, fia homo en servoj de Papp, kaj de Fábjan, ĉefdistriktestro, nobla, bonvola humanisto, la leganto konatiĝas kun la hungara provinco, kun la beleco kaj valoreco de la lando, kun malordo kaj malpureco en vilaĝoj, kun kadukiĝantaj kasteloj kaj bienoj kaj dekadencaj nobelaj familioj. La ankoraú reganta klaso ne plu havas la forton prosperigi la landon kaj la popolon, sekve tiu klaso devas perei, unuopuloj pro ilia senespera situacio eĉ fuĝas en memmortigon.
Móricz lokas siajn ĉefajn heroojn meze inter la sortoj de multaj kaj tre diverstipaj homoj, kiel estas nature. La leganto sur ĉio paĝo kredas je la realo de la panoramo. Spite al ĉiu kritiko kaj logikakonsekvenco la aútoro rigardas la homojn amike, oni ne prenas la kredon je la estonto.
Laú stilo kaj enhavo tre interesa, sukcesa romano. Leginte „Varman kamparon", oni deziras tuj legi alian verkon de Móricz.

Monika Ludewig

## Zamenhof — „fama medicinisto"

Estas konate, ke la iniciatinto de Esperanto laboris kiel okulkuracisto, sed tamen estas surprize, ke ni trovas artikolon pri li kune kun lia bildo en libro titolita „Famaj medicinistoj". Tiu 167-paĝa libro de Grzegorz Fedorowski, kies germana traduko aperis en 1981 ĉe Nasza Ksiegarnia Warszawa, enhavas ĉapitron pri kuracistoj, kiuj akiris siajn elstarajn laborrezultojn ne en la sfero de la medicino. Apud Copernicus, Schiller, Korczak, Marat kaj aliajn la aútoro ankaú envicigis Zamenhof en tiun ĉapitron kun la rimarko, ke ankaú tiajn kuracistojn, kiuj por ĉiam ricevis lokon en la historio, oni ne povas malkonsideri en vico de „famaj medicinistoj".
Memkompreneble la plej granda parto de la libro dediĉiĝas al la prezentado de medicinistoj, kiuj decide kontribuis al la evoluo de la medicino. Je la komenco de tiu vico staras la greka kuracisto Hippokrates kaj je la fino la inventinto de la penicilino Alexander Fleming. Tiu kolekto ne estus kompleta sen ankoraŭ alia ĉapitro — jenan pri nemedicinistoj, kiuj kontribuis al la progreso de la medicino. Ankau pri tiuj de Aristoteles ĝis Pasteur ni sciiĝas.
Rilate al Zamenhof Fedorowski emfazas lian multlingvecon kaj karakterizas la ellaboradon de la malkomplika internacia lingvo Esperanto kiel grandan verkon, per kiu Zamenhof fondis sian gloron ekstere de la medicino. Li aldonas kelkajn faktojn pri la estiĝo de la Esperanto-movado kaj aprezas la kulturan laboron de UEA, kiu laŭ lia konvinko kontribuis al la reciproka alproksimiĝo de la popoloj. Do tiu modesta kontribuajo montras, ke ne nur la esperantistoj konservas la memoron pri Doktoro Zamenhof

Fritz Wollenberg

## Friedebert Tuglas: Kvin noveloj. Dua, reviziita eldono, Eldonejo „Eesti Raamat", Tallinn 1984; el la estona lingvo tradukis H. Seppik. 128 p.

En la antaúparolo de A. Eelmäe por tiu bela, ilustrita libreto oni legas ke la aútoro Friedebert Tuglas (1886-1971) apartenas „al la plej eminentaj reprezentantoj de la estona kulturo". Kaj vere sin prezentas al la leganto kvin majstre konstruitaj noveloj, ĉiuj el la jaroj 1914-1917.
Certe jam la unua, „En la fino de la mondo", estas la plej valora inter ili. Temas pri paraboleca priskribo de sopiroj de la homoj (aú de la aútoro) al grandeco, interna forto kaj beleco, kaj al natura. humaneco. Homoj kvazaú „gigantoj meze de senfinajo" kiuj devis ŝajni al la samtempuloj de F. Tuglas (kaj dank' al la arto de la aútoro dum longa tempo ankaú al la leganto) esti monstroj — tio estas la bildo kiun paŝo post paŝo sintezas la poezia kaj potenca lingvaĵo de la novelo. Iom pesimisma bildo, ĉar F. Tuglas opinias sian humanecan ideon realigebla nur „en la fino de la mondo" kaj sur „insulo — pli malproksima ol la sonĝoj".
Tiun pesimisman — aú eble fatalisman — karakteron portas ankaú la aliaj noveloj: Parvenuo, opresataj homoj, anime kripligita infano kaj forlasitaj bestoj estas la herooj, kaj ĉiam ilia vivo finas en katastrofo. Nur en la lasta novelo (verkita en 1917), kuraĝaj homoj ribelas kontraú la jugo kiu ilin subpremas, sed kaúzante nur malesperon kaj morton pro la reago de ilíaj opresantoj.
Ribelo estas do ankaú tiuj-ĉi noveloj, ribelo kaj malespero samtempe, kaj akuzo pro la socio kiu kaúzis amase tiujn homajn katastrofojn. Temas pri libro nepre rekomendinda al ĉiuj kiuj kapablas ĝui belecon aperantan nur inter la linioj, malantaú la kruelajoj de pasinta ĉe ni jam epoko; rekomendinda ankaú pro la majstra traduko adekvata al la komplika strukturo de la noveloj.

Ulrich Becker

# RECENZOJ

**Por Germanlingvujo libro atuta,**
**Sed en Esperantujo verko muta.**

**recenzo pri DR. ZAMENHOFS SPRACHLICHE GUTACHTEN. LINGVAJ RESPONDOJ IN DEUTSCHER BEARBEITUNG MIT ERGÄNZUNGEN UND ERLÄUTERUNGEN de Walter Lippmann (Nachdr. der Ausg. Leipzig 1921.) Iltis, 1984. 70 p. (Jubilea eldonserio. III. Esperantologio, 8.)**

En Esperanto la titolo de tiu ĉi verko estas: La lingva ekspertizo de d-ro Zamenhof en germana prilaborado kun kompletigoj kaj klarigoj. D-ro Lippmann ne nur tradukis la konatajn „Lingvajn Respondojn" de la aŭtoro de Esperanto sed sisteme aranĝis ilin kaj aldonis klarigojn de lingvouzo. Krom la unuaj du publikigitaj kolektoj da „Lingvaj Respodoj", eldonitaj en Parizo en 1910 kaj 1913 respektive, la libro enhavas materialon ĉerpitan el **Travivajoj de Ro Ŝo** (= Richard Sharpe), publikigita en 1913, privatan leteron senditaj al Max Butin kaj Richard Sharpe, kaj ankaŭ konversacion raportitan de Marie Hankel. D-ro Lippmann, do, strebis fari kompletan kompilaĵon de ĉiuj zamenhofaj komentoj pri lingvaj problemoj.

La libro estas dividita laŭ temoj kaj havas utilan indekson. Post ĉiu numerita respondo sekvas rimarkoj, ilustraj ekzemploj kaj komparoj, kelkfoje kun esprimmanieroj en etnaj lingvoj. La fontoj estas indikitaj, kaj kruc-referencoj helpas trovi aliajn respondojn tuŝantajn la saman temon. Tiel la originalaj „Lingvaj Respondoj" de d-ro Zamenhof estis plivalorigitaj por konsultaj celoj kaj aperis en nova perspektivo jardekon post la unua libroforma publikigo. La sekva ekzemplo montras, kiel d-ro Lippmann traktis unu el la temoj. N-ro 37 koncernas la opinion de Zamenhof pri „sidiĝi", esprimitan en tri tekstlinioj. La aldonitaj rimarkoj de d-ro Lippmann okupas tutan paĝon kun pli ol 50 linioj! Li pravigas tiuspecan traktadon, ĉar lia celo estas fari la „Lingvajn Respondojn" uzeblaj por lernantoj de Esperanto.

Mi jam esprimis mian opinion pri la senŝanĝa represado de konsultverkoj eldonitaj antaŭ multaj jaroj (vidu „Malĝisdata Represo" en **Dialogo,** n-ro 3, 1982, pĝ. 55-56). Kvankam la pozitiva motivo estas fari ankoraŭfoje havebla libron longe elĉerpitan kaj ne aĉeteblan,estas ankaŭ negativa aspekto. Kun la escepto de beletraj verkoj, represajoj estas speco de „malfreŝa pano". En la specifa kazo de la recenzata libo, mi ne komprenas la kialon reaperigi ĝin post pli ol duonjarcento sen reviziado kaj ĝisdatigo Aŭ ĉu la Esperanto-movado kaj la lingvo mem tiel limakpaŝe antaŭeniris dum tiu periodo, ke tute ne gravas? Se la lingvouzaj komentoj de d-ro Lippmann faritaj en 1921 iel ĝisdatigis la „Lingvajn Respondojn" deZamenhof, ĉu ne estas konsilinde hodiaŭ ĝisdatigi la kompletigojn kaj klarigojn de d-ro Lippmann? Ja estas necese aldoni la novan materialon aperintan en eldonoj de „Lingvaj Respondoj" post 1921. La plej kompleta estas la 6-a eldono (1962) preparita de d-ro Waringhien kvardek jarojn post la libro de d-ro Lippmann. Jen du temoj, kiuj bezonas pli ampleksan pritrakton en nuntempe eldonita libro spegulanta aktualajn lingvoproblemojn. En respondoj 48/49 kaj 50/51 pri pronomoj, nek Zamenhof nek Lippmann povis antaŭvidi la ĉiam pli oftan postuladon, ke Esperanto havu ankaŭ triapersonan pronomon ne esprimantan la sekson de persono. Zamenhof pensis, ke „li" kaj „ĝi" taŭgas, kaj Lippmann apogis lin per la vortoj: **„Ganz wie im Deutschen!"** (tute same kiel en la germana lingvo!). Tamen, la fajro kaj fumo, kiujn tiu demando estigis dum la lastaj jaroj, indikas, ke ne ĉiuj estas kontentaj pri tiu „Lingva Respondo". Ankaŭ reviziendaj estas la komentoj aldonitaj al respondo 29 pri landnomoj. Duonpaĝa kompletigo apenaŭ estas sufiĉa por klarigi, kial la solvo ankoraŭ ne estas pli proksima nun, ol kiam Zamenhof kaj Lippmann ekzamenis la demandon.

Mia dua kritika demando estas: kial d-ro Lippmann verkis sian libron en la germana lingvo? Mi estas skeptika pri la klarigo, ke tiel la „Lingvaj Respondoj" kaj la rimarkoj fariĝas utilaj al tiuj lernantoj de la lingvo, kies lingvokapablo ankoraŭ ne estas sufiĉe alta, poi ke ili povu legi la saman materialon en Esperanto. Sed la temoj ja ne apartenas al la elementa kurso; ili pli konvenas por progresintoj kaj spertuloj. Prezentante sian verkon en la germana lingvo, d-ro Lippmann paradokse ne plivastigas ĝian legantaron sed, male, limigas ĝin al nur tiuj scipovantaj tiun etnolingvon. La eldonisto de la hungara — Esperanta frazeologia kompilajo konata kiel **Domfabriko** faris la saman eracon, ĉar la ŝlosilo por malfermi tiun trezorejon de lingva materialo estas la hungara lingvo!

Miaopinie, multe pli konvena kaj digna ero en la Jubilea eldon-serio estus ĝisdatigita Esperanta versio de la malnova verko de d-ro Lippmann. Ankoraŭ ne estas tro malfrue fari tion.

Bernard Golden

**William Gilbert: Pri landnomoj en Esperanto. Hungara Esperanto-Asocio. Budapest 1985, 12 p.**

Elirante de la prava vidpunkto, ke Esperanto ne nepre en ĉiuj rilatoj devas „nature" evoluadi ekzakte kiel etnolingvoj, sed necesas „minimuma disciplino kaj racieco", la aŭtoro analizas la prezentojn de la landnodemando en Plena Analiza Gramatiko kaj de la Akademio. Li prezentas sian propran provon disdividante la landnomojn en du kategorioj. Kategorio A. La radiko montras la nomon de popolo, etno, ĉefetno aŭ civitanaro": Polon/o — Polon/io, Dan/o — Dan/io, —land— povas esti uzata anstataŭ —i— aŭ —uj—. En kategorio B. la radiko montras landnomon, kaj oni derivas el ĝi la respondan popolnomon per aldono de —an—. Nederland/o — Nederland/ano, Finland/o — Finland/ano, Vjetnam/o — Vjetnam/ano k. s. Per tiu kategoriigo Gilbert sendube ne solvis ĉiujn problemojn laŭ ĉies gusto.

Tamen, atentinda diskutkontribuo al longe (tro longe?) diskutata problemo.

-e

# RECENZOJ

## Bertin, Christian (red.): Aktuala Komputiko. Kajero 1. Marto 1985. Cesson-Sevigne 1985. 50 p. 19 FRF. Havebla ĉe la aútoro aú la libroservo de UEA.

La redaktita kaj eldonita de C. Bertin unua kajero de „Aktuala Komputiko" estas fakrevuo ekskluzive por komputeristoj, ne (kiel „Internacia Komputado") determinata al la vasta publiko. Estonte ĝi aperos sub la titolo „Komputikaj Esploroj", se . . ., jes, se alvenos sufiĉa kvanto da altnielaj kontribuoj. Jen problemo ĉiam aktuala por fakrevuoj! Pensebla estas estonta taskodivido inter IK kaj KE: la unua por la „hejmkomputeristoj", aplikantoj kaj amatoroj, la dua por sciencistoj kaj teknikistoj.

Sed reen al tiu kajero. Ĝi enhavas kvar artikolojn de C. Bertin (prelegservilo „TISANE"), B. Gärtner (ALGOL 60, stor-kopiado), kaj M. Vandem Bempt (Defanda kaj dinamika analizo). Elstaraj estas (kiel kutime ĉe la eldoaĵoj de Bertin) la preskvalito kaj la ekstera aspekto de la libro, bonaj la desegnaĵoj. Nepre mi volas mencii, ke ankaú la strukturo de la artikoloj estas profesi-nivela (resumo en minimume du lingvoj, indikvortoj, bibliografio, biografio de la aútoro!), kiel mi konas ĝin de famaj internaciaj revuoj.

Per AK la esperantistaro disponas pri plia montrinda verko, kiu senhonte povas stari inter la naciaj revuoj kaj libroj sur la libro-breto de komputeristo.

Michael Lennartz

## Bertin, Christian: Computer-Dictionary English-Esperanto (draft). Cesson-Sevigne 1985. 106 pĝ. 40 FRF. Havebla ĉe la aútoro aú la libroservo de UEA.

Post longa kaj skrupula preparado C. Bertin, la nuntempe certe plej produktiva faka aútoro esperantlingva, publikigis komputeran vortaron anglan-Esperantan. Ĝi estas ne nur la plej ampleksa (61 paĝoj kun pli ol 3800 terminoj) sed ankaú la plej moderna komputerteknika vortaro. Ĉi tie oni trovas preskaú ĉion, kio rilatas al komputeroj: logikaj, elektronikaj, programaj, materialaj esprimoj. Mankas nur malmultaj nocioj estiĝintaj en la lastaj jaroj (minidisc, Winchester-drive), sed tio estas normala pro la rapidega evoluo de la komputera tekniko.

La kvalito de la tradukoj ne dubindas, Bertin dum tre longa tempo preparis la vortaron kaj diskutigis ĝin en rondo de ok kunlaborantoj el diversaj landoj. Laú mi estas unika, ke fakvortara aútoro prenas sur sin la ŝarĝon de kroma multobligado kaj resumado. Bertin meritas apartan laúdon pro tio. Kompreneble kelkaj terminoj plue restas diskutindaj, ekz. por „byte" mi preferus „bajto" (ne: bitoko), kiu estas jam vaste uzata, simile „pelilo" anstataú „unuo" por „drive" /germ. Laufwerk/. Pri tio decidos la estonteco, kaj la aútoro sin esprimis simile en la antaúparolo.

La libron kompletigas ampleksega listo de mallongigoj (28 p.) kaj diversaj tabeloj. Tiu vortaro estos bonega laborilo por ĉiu teknikisto-esperantisto, kaj mi varme rekomendas ĝin.

Michael Lannertz

## Kontribuo al lingvaj teorio kaj praktiko. Slovakia Esperanto-Asocio. Poprad. Vol. I: 1983, 59 p.; Vol. II: 1984, 79 p.; Vol. III: 1985, 79 p.

Jen nova agadkampo de la solide laboranto Slovakia Esperanto-Asocio. Ekde 1982 SEA ĉiujare en Nitra okazigas lingvajn seminariojn, kiuj aparte traktas teoriajn problemojn de interlingvistiko kaj esperantologio. La tri kajeroj entute prezentas 20 referaĵojn de 11 diversaj aútoroj, inter ili 2 eksterlandanoj (B. Wacha, R. Rokicki). La plej aktiva kontribuanto estas d-ro Stanislav Kośecký, promesplena nova aktivulo en la interlingvistika kampo.

Ne eblas ĉi-tie recenzi la unuopajn kontribuojn. Sed por prezenti la interesan enhavan profilon de la seminarioj en Nitra ni prezentas la liston de la referaĵoj:

I: Stanislav Kośecký: Pri la objekto kaj taskoj de interlingvistiko/Magda Šaturova: Kelkaj problemoj ĉe tradukado de poezio, prozo kaj kantoj en Esperanto/Stanislav Kośecký: Rimarkoj al la esperanta morfema strukturo/Eduard Gašinec: Kelkaj lingvosciencaj, metodikaj kaj didaktikaj rezultoj de la esploro de instruado kaj lernado de Esperanto en la slovakaj bazaj lernejoj/Magda Šaturova: Preparo de la tekstoj por preso el vidpunkto de sintakso kaj de stilistiko/Vladimir Gregor: Ebloj kaj limoj de Esperanto el la vidpunkto de la komunikado.

II: Erich Spitz: Genro kaj sekso en la etnaj lingvoj kaj en Esperanto/Jiři Zeman: Rimarko al fonologia sistemo de Esperanto/Vladimir Gregor: Signoj de la vivanteco de Esperanto/Aleš Bednařik: Bazaj principoj de Esperanta terminologio/Eduard Gašinec: Struktura tipologio de Esperanto/Stanislav Kośecký: La loko de Esperanto en la kategorio „homa lingvo".

III: Jiři Zeman: Al la problemaro de silaboj en Esperanto/Jan Werner: Stabiligo kaj normigo de terminaro/Balázs Wacha: Gradoj de ekzisto/Erich Spitz: Negado kaj ĝiaj problemoj en etnaj lingvoj kaj en E/Ryszard Rokicki: Kelkaj metodologiaj problemoj entrepreni la esploradon de la lingvo Esperanto/Stanislav Kośecký: Asimetria dualismo kaj ĝia manifestiĝo en Esperanto/Vladimir Gregor: Pri la modaleco en la slovaka lingvo kaj en Esperanto/Aleš Bednařik: Internacieco en leksiko.

D. B.

# KORESPONDDEZIROJ 31635

**Ni publikigos nur tajpitajn koresponddezirojn!**

## Bulgario

Lernantino, 15j., dez. kor. tutmonde p. ĉ. t.; Vania Aleksandrova, **Sofia-Busmanci,** General Gurko Str. 29

Lernantino, 13j., dez. kor.: Donka Slavĉeva Koleva, **8600 Jambol,** K.-S Lenin bl. 11, vh. b. ap. 39

27j. fraúlo dez. kor. kun junulino el GDR pri folkloro, muziko, arto, historio: Krasimir Jekov, **9005 Varna,** K.SO Čajka bl.3, vh D, ap. 64

Julian Biserov Ognianov, Bojurovo,**Razgradsko, 7335,** str. Anton Straŝimicov 9, 19j., dez. kor. kun GDR-anoj pri muziko, sporto.

## ČSSR

Veronika Kmetová, **84101 Bratislava,** M. Sch. Trnavského 18, 43j., oficistino, dez. kor.

Inĝenierino, 37., dez. kor.: Ludmila Moleková, **962 61 Dobrá Niva 190**

Ekonomistino, 29j., dez. kor. tutmonde pri ekonomio, politiko, sporto, filmo k. a., kol. bk: Eva Nollová, Ohradni 1353, **14000 Praha 4-Michle**

Zdenêk Kolenský, Plázdènà 954, **26801 Horovice, 30j.,** dez. kor. pri sporto, vojaĝo, jogo, kol pm, bk

Lernanto, 18., dez. kor. kun geamikoj el GDR p. ĉ. t.: Sándor Fehér, **951 02 D. Obdokovce 152**

Nova esperantistino, 35j., dez. kor. pri turismo, muziko, kol. bk: Nana Vaškova, Blevice 38, **273 28 Zákolany**

30j. fraúlo dez. kor. pri arto, libroj, vojaĝoj: inĝ. Jiri Pastor, K. Hájku 2968, **73801 Frýdek-Místek**

Komencanto, 45., Kemiisto, dez. kor. pri la vivo en GDR, kol. pm: Ivo Orlík, Astrová 14, **821 01 Bratislava**

## GDR

Junulo, 19., dez. kor. pri Esperanto, latinidaj lingvoj, poemoj: Steffen Schneider, **8705 Ebersbach,** Weberstr. 20

21j. elektroteknikisto dez. kor. tutmonde p. ĉ. t., kol. bk: Ulf Beling, **7980 Finsterwalde,** Kirchhainer Str. 13

Katrin Lutze, **1401 Freienhagen,** Klein Siedlung 19, 23j., dez. kor. tutmonde pri naturprotektado, pentroarto

Studento-fervojisto, 21j., dez. kor. tutmonde kun gejunuloj, kol. esperantajojn: Torsten Häusler, **3060 Magdeburg,** Robert-Seitz-Str. 2

Uta Schneider, **1804 Lehnin,** Am Hasenkamp 22, 21j., dez. kor. tutmonde pri muziko, lingvoj, E-movado

Kuiristo, 30j., dez. kor. tutmonde pri turismo, kulturhistorio, kol. bk, pm: Peter Bielack, **2553 Graal-Müritz,** Ernst-Thälmann-Str. 49

Sven Opelka, **1910 Kyritz,** Poststr. 1, 19j., dez. kor. tutmonde p. ĉ. t.

Anke Papst, **7420 Schmölln,** Pfarrgasse 9, dez. kor. tutmonde pri muziko, vojaĝoj, literaturo, E-movado

## Hungario

Internacia geedza paro dez. kor. tutmonde p. ĉ. t., kol. bk pri hundoj: Rozé Aukŝtikalnyte (25j. litovino), Csaba Székely (30j. hungaro), **6500 Baja,** Zsivánovics u. 8 fsz. 2

## Kubo

Ramón Pérez Moya, Prolongacion P. Gómez 94, Ranchuelo, Villa Clara, dez. kor. tutmonde kun pacbatalantoj

## Pollando

18j. lernantino dez. kor. tutmonde pri literaturo, turismo, muziko, kol. bk, pm: Dorota Rać, **11-214 Baliny woj. Olstyn**

Barbara Kruszewska, **19-300 Etk,** ul. Słowackiego 9/2, 18j., dez. kor. tutmonde

Komencanto, 21j. studento, dez. kor. tutmonde p. ĉ. t., kol. bk; Rafał Frackowiak, Korczaká 10, **64-000 Kościan**

16j. lernantino dez. kor. tutmonde pri turismo, literaturo, muziko: kol. bk, amuletojn: Jowita Zawada, Zalesie 55, **32-312 Jaroszowiec,** woj. Katowice

28j. laboristo dez. kor. tutmonde p. ĉ. t.: Bogusław Urbaniak, ul. Kościuiszki 7, **42-620 Nakło** Sl.

Renata Michałek, **58-200 Dzierzoniów,** os. Złote 8/1, 36j. fraúlino, dez. kor. tutmonde p. ĉ. t.

Katarina Mróz, **80-266 Gdańsk,** al. Grunwaldzka 176/6, 23j. studentino pri oligofrenipedagogio, dez. kor. kun samfakaj studentoj kaj k. personoj laborantaj en specialaj lernejoj

Herausgeber: Kulturbund der DDR
Redaktion: 1080 Berlin, Charlottenstr. 60
Fernruf: 2 20 29 91
Verantw. Redakteur: Dr. Detlev Blanke.
Redaktionskommission: Hans Heinel, Werner Pfennig, Rudolf Hahlbohm, Ludwig Schödl. —
Veröffentlicht unter der Lizenz-Nr. 648 des Presseamtes beim Vorsitzenden des Ministerrates der DDR. —
Erscheinungsweise: 6mal im Jahr. Preis pro Einzelheft 30 Pf.
Druck: Druckerei Aue, 9400 Aue,
Artikel-Nr. (EDV) 7928 3 2 16